REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

komuna eldono de REU kaj REJM *№ 5-6 (18-19) decembro 2003*

en la numero

REK-23 kaj EoLA-16 atendas vin

jubileoj de Nikolao Gudskov, SEJM-2, Aleksandr Logvin, Ludmila Jevsejeva, Mikaelo Giŝpling, Bronislav Ĉupin, Tjumena E-klubo

rakonto pri StRIGo-9

IJK en Rusio: Internacie, June kaj Kune

novaj prezidantoj en JEAĈR kaj UkrEA

aperis nova disko el la serio "Oraj kantoj"

peco el la nova romano de Mikaelo Bronŝtejn

interese kaj amuze pri katoj

"Bulteno de REU" kaj "REJM-info"

novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2003



La 1-an de julio 2003 mi estis en bonfara koncerto "Bardoj kontraŭ la milito en Ĉeĉenio", en kiu partoprenis famaj rusaj bardoj. De unu el ili – tre ŝatata de mi Aleksandr Gorodnickij – mi aŭdis poemon, kiu tre frapis min. En la paŭzo mi venis al li kaj diris: "Tio estas esperantisma poemo!". Li respondis, ke konsentas (evidente, pri nia lingvo li ion scias). Mi promesis al li traduki ĝin al Esperanto. La teksto obsedis min, kaj jam sekvatage mi faris la tradukon, kiun nun juĝu la esperantistoj...

Nikolao Gudskov (Moskvo)

ALEKSANDR GORODNICKIJ

LA VORTA PARENCECO

El sperto de epokoj kaj de landoj
Aperas simpla vero nun en sol':
El sanga parencec' naskiĝas bando,
El vorta parenceco – la popol'.

Pro tio, ne por peti ian preĝon,
Sed nur aperu iu certa test',
La dio al Moseo donis leĝon,
Por ke la hom' distingu sin de l' best'.

Ne gravas por la bando leĝ' de l' dio,
Ĝi vivas spite al la testament',
Valoras en mizero de konscio
Nur flarkapablo kaj la akra dent'.

Gepatrojn ami ja ne estas strango,
Fieri pri l' deveno estas sort',
Sed se la vort' kontraŭas al la sango,
Elekto mia ĉiam estas vort'.

Alternativo mankos ĝis la morto,
Turniĝos vane pro objetoj lang':
De vorta parencec' devenas vorto,
De sanga parencec' devenas sang'.

esperantigis Nikolao Gudskov

BONVENON AL LA FEBRUARA VOLGOGRAD POR…

… REK-23 *(21-24.02.2004)*…

En la programo de la 23-a Rusia Esperantista Kongreso estos:

1. La 20-a Konferenco de REU (kun elektoj de la Prezidanto, Estraro, Kontrolrevizia Komisiono kaj aliaj funkciuloj de REU). La anticipa pridiskuto de kandidatoj por la postenoj okazos januare-februare de 2004 en la retlisto <reu-agado>. Se vi interesiĝas pri estonto de REU, de Esperanto en Rusio, pri evoluo de nia movado, pri la konsisto de novaj gvidorganoj en nia Unio, vi nepre devas partopreni en la Konferenco por diskuti kaj voĉdoni (se vi estas membro de REU) pri ĉio ĉi. La Konferenco komenciĝos matene la 22-an kaj finiĝos matene la 24-an de februaro, tamen se bezonatos, ĝi povos daŭriĝi ankaŭ tage kaj vespere la 24-an.

2. Voĉdonado pri Atingoj de la Jaro 2003 en Rusia E-movado (kun antaŭa prezento de la kandidatoj). Tiu ero okazos jam la trian fojon. Dum la restinta tempo REU-Estraro kolektos proponojn pri la kandidatoj por la titoloj "Rusia Esperantisto-2003", "Rusia Esperantaĵo-2003", "Rusia Kantisto-2003", "Rusia Poeto-2003" kaj "Rusia E-Aranĝo-2003". Ankaŭ vi povas partopreni en la kandidatigo, se plenigos kaj sendos al la adreso de REU voĉdonilon, ricevitan kun tiu ĉi REGo (voĉdoni rajtas ajna rusia esperantisto, ĉe bezono la voĉdonilon eblas multobligi). Po kvin kandidatoj por ĉiu branĉo, kiuj kolektos plej multajn voĉojn, estos prezentitaj al la kongresanoj. Okazos speciala programero, dum kiu oni rakontos pri ĉiuj kandidatoj, iliaj atingoj kaj sukcesoj. Post tio okazos la voĉdonado inter la kongresanoj, rezulte de kiu estos anoncitaj Atingoj de la Jaro 2003 en Rusia Esperanto-movado.



prezento de Atingoj de la Jaro 2002

3. Primovada programparto (seminarioj, diskutrondoj, primovadaj prelegoj), kiun preparos kaj gvidos REU-estraranoj kaj aliaj aktivuloj.

4. Kleriga parto (prelegoj pri diversaj temoj, perfektigaj kursoj, ĈALK-ekzamenoj). Al ĝi povas (kaj devas) kontribui ajna partoprenonto. Vi povas prepari esperantlingvan prelegon aŭ prezenton de io ajn (E-movado, ŝatokupoj, sciencoj, distraĵoj, historio, interesaj personoj, literaturo, muziko, aranĝoj ktp.), kio estas interesa por vi. Pri ĉiuj tiuj programproponoj bonvolu skribi al la adreso de REU.

5. Aktiviga kaj distra partoj (konkursoj, koncertoj, kvizoj, intelektaj ludoj).

… kaj EoLA-16 *(25-28.02.2004) kun la temo* *"Malsame!"*

Ĉu vi eventuale scias, kiom da manieroj ekzistas por travivi la vivon? Dubinde. Ĉar la moderna mondo estas tia, ke vivo ene de ĝi mirinde diversas. Formoj de la vivo varias de ekstreme aktivaj, fojfoje danĝeraj kaj riskaj ĝis trankvilaj aŭ senmovaj. Aŭdaca ekstremulo, meditema filozofo, libera naturisto... – ĉiuj ĉi homoj vivas en apartaj dimensioj, spiras apartan aeron, suferas pro apartaj malsanoj, ĝuas apartajn ĝojojn, sed... kunpuŝiĝas vid-al-vide preskaŭ ĉiuvespere, ĉar ili loĝas en la sama urbo, en la sama strato, aŭ eĉ en la sama ŝtuparejo. Elekton de tiu aŭ alia maniero de travivado nemalofte determinas ne volo aŭ konscio de la homo, sed aro de hazardaj cirkonstancoj. Inter tiuj povas esti interesoj de la gepatroj, aŭ televidelsendo, libro aŭ revuo, subite malkovrintaj la mondon, aŭ simple la loĝloko. Tamen ni estu honestaj: ĉu vi ŝatus senti vin same kiel truhavanta boato, per kiu ludas ondoj kaj vento, ĉu vi ŝatus sekvi la kondukŝnuron de ŝanco, fidante ĝin organizi la ritmon de via propra vivo? Se ne, do kion vi entreprenis por trovi vian propran lokon sub la suno? Ĉu en multaj roloj vi vin provis? Ĉu multajn aspektojn de via karaktero vi ekzamenis? Ĉu ĉiujn animajn impetojn vi sekvis? Ĉiu homo estas enigmo. Ankaŭ via animo estas unika. Sed vi devas diligente ĝin esplori – tiam vi, espereble, eltrovos manieron vivi laŭ imanenta nur por vi vivstilo. Ĉiuokaze vi povos certe konfirmi: ja mi serĉis, mi provis!

ĉi-jara EoLA-15 en Novosibirsk estis gaja kaj interesa

Volgograda EoLA-16 per la kutima arta maniero kreos kondiĉojn por tiuspeca serĉo, allogos homojn, kiujn oni ofte nomas serĉantaj. Se vi apartenas al ilia aro, bonvenu ankaŭ vi! Kaj memoru: ne ekzistas du tutsamaj homoj, sekve ne ekzistas du tutsamaj nedistingeblaj vivmanieroj. Ĝuste pro tio ĉi-foje la ĉeftemo estas: "Malsame!".

Enkadre de la festivalo okazos **Kanta konkurso** (originala kanto, tradukita kanto, plenumo); **Poezia konkurso** (originalaj versaĵoj, tradukitaj versaĵoj, deklamado); **Teatra konkurso** (teatraĵoj, muzikaloj, skeĉoj, humuraĵoj); **Urbo de majstroj** (konkurso pri manfaritaj aĵoj, ludo "Majstroj"); **Reto de majstroj** (konkurso pri Interretaj paĝoj de organizoj, kluboj, aranĝoj kaj personoj); diversaj interesaj ĉeftem-rilataj **Metiejoj kaj Kursoj** (inkluzive Esperanto-kursojn); **Fina Maskobalo** (kun ludoj, Danca konkurso kaj festo "Vintra Nokto").

unu el la teatraĵoj dum EoLA-15

Vespera kaj nokta programoj enhavos koncertojn de famaj E-muzikistoj (por koncerti al EoLA venos el Francio JoMo, okazos ankaŭ la koncertoj de la plej popularaj rusiaj aŭtoroj kaj kantistoj); diskotekojn kun la nepra "La Bamba"; Bardan Kafejon kun trankvila te- aŭ bierumado.

Ŝatantoj de ekstrema ripozo povos gliti laŭ glaciaj deklivoj de bordoj de la Volgograda maro kun posta banado en speciale organizita glacitruo.

Taskoj por la partoprenontoj de EoLA-16:

- La plej spektindaj dum EoLA estas certe teatraĵoj. Por partopreni la Teatran konkurson ĉiu teamo devos prezenti teatraĵon ĉeftem-rilatan, t.e. dum la elpaŝo respeguli unu aŭ kelkajn vivstilojn de la moderna mondo. Por ke surscenigoj estu plej diversaj, teamoj ricevos ĝeneralan direkton, enkadre de kiu oni ellaboru teatraĵon. Tial kiam ni (la lokaj organizantoj) ekhavos konfirmon, ke el konkreta urbo alveturos ĝuste teamo, deziranta elpaŝi dum la Teatra konkurso, ni al ĝi tuj sendos la taskon. Detalojn la teamo ellaboros mem kaj poste informos nin pri nomo de sia teatraĵo kaj vivstiloj, ludantaj la ĉefan rolon en ĝi. Memkompreneble, se la teamo deziros elpaŝi ankoraŭ kun alia spektaĵo, tio estos laŭdinda kaj eble notinda.
- Senpacience ni atendas viajn kantojn kaj versaĵojn originalajn kaj tradukitajn, verkitajn de vi kaj de aliaj aŭtoroj.
- Rakontu pri viaj scioj kaj scipovoj rilataj al la deklarita ĉeftemo de la festivalo. Viaj unikaj prelegoj aŭ kursoj estos tre utilaj sendube.
- Nepre kunprenu por la Fina Maskobalo viajn specialajn vestaĵojn, kiuj substrekas vivmanieron, kiu por vi estas la plej plaĉa.
- Kreu viajn retpaĝarojn – privatajn, klubajn kaj aliajn. La Interreto bonege kombiniĝas kun Esperanto. Ni faru la kombiniĝon maksimume efika! La konkurso montros tiujn, kiuj faras ĉi tion plej bone, por ke ankaŭ aliaj esperantistoj strebu al la sama aŭ eĉ pli bona rezulto.

➢ Ne forgesu alporti rezultojn de via manfara agado (t.e. aĵojn, kiuj estiĝis pere de vi) por la respektiva konkurso.

BEZONATAJ INFORMOJ

La loko. Rusia Esperantista Kongreso kaj la festivalo EoLA okazos apud la urbo Volgograd, en la ripozbazejo "Verda Ondo", kiu situas ĉe la Volgograda maro. Por atingi ĝin necesas de la volgograda fervoja stacidomo iri perpiede al la busa stacidomo (5-10 min.). Tie bonvolu aĉeti kontraŭ ĉ.20 rub. la bileton ĝis "Зелёная волна" ("Verda ondo"): eblas veturi per la buso "Dubovka" aŭ per itineraŭto № 193, tre oftaj de la 7-a ĝis la 21-a horo. La veturo daŭras iom pli ol 1 horon, ĉar la veturilo komence iras tra nia longa urbo. Post la veturo serĉu la indikilon kaj iru laŭ rekta vojo ĝis la ripozbazejo (20-30 min.). Se vi venos petveture, bonvolu konsideri ke la necesa haltejo situas ĉe la Saratova ŝoseo (tuj post "Dubovka", se veturi de Saratov). La registriĝo komenciĝos la 21-an de februaro 2004 je la 14.00.

tiel aspektas la konstruaĵo, en kiu pasos REK-EoLA

La prezoj. Loĝado dum REK-EoLA kostos tage: en 2-lita ĉambro – 200 rub., en 3-lita – 170 rub., en amasejo (surplanke en propra dormosako) – 60 rub. Manĝado (eblas antaŭmendi ordinaran aŭ vegetaran) kostos 80 rub. tage.

Kontaktoj. La aliĝilojn kaj monon bonvolu sendi al ***Eduard Kolosov, str.Vostoĉno-Kazaĥstanskaja 6 – 46, 400094 Volgograd.*** Por kontaktoj kaj informiĝo vi povas uzi ankaŭ la retadreson <edya@yandex.ru>. Kelkaj telefonnumeroj de volgogradaj esperantistoj: Lana – (904) 7781747 (poŝa), Tanja – (8442) 733592, Nastja kaj Olja – (8442) 730538, Oleg – (8442) 437508. La plej freŝajn informojn pri la programo, prezoj, kondiĉoj, aliĝintoj vi povas trovi ĉe la ttt-ejo de la aranĝoj <http://www.stelaro.by.ru/rek-eola/esp/>.

Krome, la 29-an de februaro en Volgograd okazos la 3-a Lingva Festivalo, en kiu partoprenos JoMo. Pri la unua kaj dua LF en Volgograd vi povas legi ĉe <http://www.stelaro.by.ru/vejc/esp/eventoj_lfrezultoj.html> kaj <http://www.stelaro.by.ru/vejc/esp/eventoj_lfrezultoj2.html>.

Nikolao Gudskov – 50-jara

KIO ESTAS AMIKECO

Kolja, Nikolao, Olda Koboldo!

Nun mi intencas publike konfesi al vi mian amikecon. Ekzistas amikoj kaj amikoj. En la senco – raraj unuopuloj kaj multaj simpatiaj homoj. Do, en mia vivo vi sendube apartenas al la unuopuloj. Interese, ke mi ne rapide tion komprenis. Bezonatis multaj jaroj da komuna agado. Kaj tra tiuj multaj jaroj mi, verŝajne (mi jam ne povas plene reveni al la tiama stato), opiniis vin simple bona samideano. Tamen relative antaŭnelonge la kvanto transformiĝis al la kvalito – kaj mi konstatis, ke vi estas unu el la plej valoraj, plej karaj, plej necesaj, plej amataj miaj amikoj. Kol', kion vi liveras al mi?

La unua valoraĵo, kiu tuj venas en la kapon, estas la fido. De ĝi nia amikeco startis. Estis vi, kiu en 1988 invitis min labori en la instrua kooperativo "Kopso", kaj, same kiel vi, mi lasis mian ŝtatan laboron kaj profesie ekokupiĝis pri Esperanto – kio por ĉiam kerne ŝanĝis mian vivon. (Kio okazus al mi, se tiam vi preterrigardus min?) Tra jaroj – al la nuno. Ĉi-septembre estis vi, kiu respondis al miaj duboj: jes, vi estas bezonata en la Dagestana konferenco pri lingvoj kaj kulturoj; jes, vi, certe, elpaŝos inde. Mi iris, kaj ni kune faris tie la tutan "Esperantan veteron". Do, vidu: per la fido vi malfermas en mi novajn kapablojn, kaj por mi – novajn eblojn, novajn horizontojn.

Due. Estas miraklo: ĉio, kion ni planas kune, rezultiĝas. Kaj kvazaŭ per si mem. Nu, babiletis ni horeton telefone, nu, renkontiĝis por 10 minutoj en la klubejo, nu, interŝanĝis paron da retmesaĝoj. Kaj faris programon por... (por kio nur ni ne faris kune programojn, prelegojn, seminariojn, kursojn, verkojn...) – kaj realigis. Ĉe tio mi ne memoras troajn nervajn streĉojn, skandalojn, pretendojn – komprenemo, estimo, akceptemo.

Trie kaj laste – laŭ la tradicio, sed ne pro tio, ke mankas pri kio diri. Via maltruda eruditeco. Kaj mia plena komforto esti nenionscianta apud vi. Mi neniam hontas fari al vi la plej primitivajn demandojn – kaj vi, scianta multegon el ajnaj sferoj, ĉion al mi klarigas pacience, kompreneble kaj nehumilige. Estas trajto de vera inteligenteco. Ĝenerale por mi vi estas rara reprezentanto de la formortanta moskva inteligentularo, kies spiriton mi ĉiam sentas en via hejmo... Do, Kol', vivu

longe, bonsanu, bonfartu – vi estas ege bezonata por rusia E-movado kaj por mi persone!

Irina Gonĉarova (Odincovo)

Kiam oni longe konas iun bonan personon, ba!, kun miro rekonsciiĝas pri ronda atingo en lia vivo. Kaj kun agrablo malvolvas fadenon de sia memoro – "kiam, kio, kiel...". Kiam okazis renkontiĝo, konatiĝo, amikiĝo finfine.

Ankaŭ mi kun plezuro rememoras momenton de nia amikiĝo kun Nikolao Gudskov. Tutcerte mi konis lin delonge, sed mi konsideras, ke ni firmigis nian amikecon kiam mi sekrete akceptis lin en mia hejmo en Tomsk... Estas iom amuze legi "sekrete", sed estis tiel.

Novembre de 1990 en Tomsk okazis la unua InterOSER (tiam la unuan fojon venis eksterlandaj gastoj en la ankoraŭ fermitan por eksterlandanoj urbon). La aranĝo estis tre malordinara, tiom pli, ke por 3-taga regiona E-renkontiĝo en Siberion venis gastoj el Moskvo: Irina Gonĉarova kaj Nikolao Gudskov.

Mi tre volis inviti ilin gasti ĉe mi hejme, sed mia tiama edzino severe malpermesis inviti iujn gastojn. Des pli espojn. Mi kun mia 8-jara filino Karina tamen organizis komploton kaj venigis tage onjon Irina-n (ĉe kiu printempe ni gastis) kaj Nikolaon. Mi tiam konis lin kiel kunlaboranton en E-kooperativo "Kopso", multe aŭdis pri li de I.Gonĉarova, sed persone preskaŭ ne konis. Ni laŭ malnova tradicio sidis en la malvasta kuirejo, trinkis teon, agrable babilis. Kaj poste iris al vica programero de la aranĝo.

Karina nur post kelkaj semajnoj konfesis al la patrino, ke estis gastoj-esperantistoj. "Fulmotondroj" estis, sed ne tiom fortaj.

Post tiam mi konsideras, ke mi efektive amikiĝis kun Nikolao, kun la persono, kiu scipovas kunlabori kun diversopiniantaj espoj, kiun plenmerite estimas plejmulto de espoj en nia lando.

Gennadij Basov (Odincovo)

AKROSTIĤAJ RIMPORTRETOJ DE DU JUBILEULOJ

I. (12.11.53)

Ni bone konas tiun ĉi personon –
Inteligentan, plenan de fervoro,
Konstante pretan pli al la laboro
Ol al riskem' por gajni duban monon.

Li ja havigis al ni "Epitomon";
Akceptas li proksime al la koro
Ofendojn kontraŭ Esperant'-honoro;
Gvidante nin, ne uzas li bastonon.

Universala nia asocio
Delegitigas lin dum multaj jaroj,
Sed dank' al la dumviva energio

Kalvaĵo dume mankas en la haroj.

Obstinas li kaj firmas kiel fero –
Verŝajne, estas trajt' de l' karaktero.

II. (18.12.63)

Konstante vigla kaj agema,
Organizanto plej talenta;
Konturo lia korpulenta –
Ornam' de renkontiĝ' ajntema.

Li zorgas pri afero prema:
Inform' pri novaĵar' torenta –
Jes, ĉiam vigla kaj agema,
Administranto plej talenta,

Gazeton faru pli problema!
Anekdotanto elokventa,
Ravanta per rideg' plendenta,
Intelektulo libr-legema,

Konstante vigla kaj agema.

Viktor Aroloviĉ (Moskvo)

BONDEZIRE AL BRONISLAV ĈUPIN

Multajn interesajn personojn mi feliĉis renkonti en Esperantujo, sed ĉi-foje mi volus rakonti pri Bronislav Denisoviĉ Ĉupin el la urbo Iĵevsk.

Nia unua renkontiĝo okazis en Kazanj dum EoLA en marto 1995. Hazarde preterirante laŭ koridoro, ni interŝanĝis nur kelkajn ordinarajn frazojn. Poste mi vidis lin sur scenejo, fervore deklamanta ion. Mi ne memoras kion (ĉar ĝenerale ne multe interesiĝis pri deklamado), sed la pasia deklamado de Ĉupin ege impresis min.

La duan fojon ni renkontiĝis dum Eŭropo-Azio'97 en Jekaterinburg. Ankaŭ tie ni ne multe interparolis. Bronislav Denisoviĉ nur petis sendi al li kasedon kun miaj kantoj, kaj mi kun plezuro faris tion. Post lia dankletero komenciĝis nia korespondado; nun ni vere amikiĝis. Ĉiu lia letero estis enhavoriĉa, interesa, plena de amo al Esperanto kaj muziko. Ĉiufoje, ricevinte vican leteron, mi miregis, kiel simpla inĝeniero-konstruisto povas tiom profunde koni kaj ami muzikon?! Mi hontis, ke mi – profesia muzikistino – ne scias tiom, kiom scias li. Sed vere, mi amegas Esperanton kaj muzikon ne malpli ol Bronislav Denisoviĉ…

Okaze de la jubileo (li festis la 70-jariĝon en julio de la nuna jaro), gratulante lin, mi tutkore deziras al li eternan animan junecon, feliĉon kaj fekundan kreadon. Estu en la mondo pli multe da tiaj homoj, kia estas Bronislav Denisoviĉ Ĉupin!

kun profunda estimo Nina Djomuŝkina (Sjasjstroj, Leningrada reg.)

Ankaŭ REGo tutkore gratulas Bronislav Denisoviĉ okaze de la jubileo!

LA ROMANTIKA SEJM-2

rememore al ĝia 15-jariĝo

Statute la 2-a SEJM estis fondita dum la Novjaro 1988/89 en Taŝtagol, Kemerova regiono. Sed, kompreneble, ĉio komenciĝis iom pli frue.

Pli precize – en la somero 1988, enkadre de la tenda tendaro VolgEJT-2, proksime de Urjupinsk (reala urbo!) en Volgograda regiono.

La iniciato, por diri honeste, apartenis al mi (tiam Andrej Ananjin – Red.). Tiutempe mi jam tre multe faris en Volgograd kaj la apuda Volĵskij: en 1988 en tiuj urboj funkciis 8 E-kluboj, eldoniĝis rapide populariĝanta informilo "Eksciu, ke...", estis lanĉita EoLA... sed ĉiam pli sentiĝis, ke por plua progreso bezonatas aktiva interurba E-teamo.

la Organiza Komitato de OkSEJT-29 en 1988: plej maldekstre staras Saŝa Malacion, antaŭ li sidas Andrej Ananjin, la dua de la dekstra flanko staras Gena Basov, antaŭ li sidas Garik Kokolija, apude sidas Lena Lebedeva, malantaŭ ŝi staras Dima Oŝĉepkov

Tial dum aktivula kunveno en VolgEJT mi proponis al la ĉeestintoj paroli pri ia nova junulara E-organizo. Kaj mi plene fiaskis! "Por kio ni bezonas pliajn funkciulojn, kiuj zorgus nur pri la pluekzisto de siaj postenoj?" – tiel eblas resumi la respondojn. Ja antaŭ niaj okuloj estis la ekzemplo de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj kaj de ĝia junulara komisiono, kiuj interesiĝis nur pri internacia E-turismo kaj sia aktiva partopreno en ĝi. (Ni eĉ ne parolu pri aliaj "oficialaj organizoj" de Sovetunio.) Aliflanke, la junularaj E-tendaroj (OkSEJT-oj) kvazaŭ memstare organiziĝis ĉiujare, informoj fluis, kursoj okazis, interurbaj renkontiĝoj abundis... Kion pli? Ĉio estas kaj funkcias! Nenio bezonatas!

Tamen, feliĉe, inter la diskutintoj silente ĉeestis unu persono, kiu subtenis la ideon kaj plene akceptis ĝin. Sed li ne interesiĝis babili. Li aliris al mi tuj post la

fiaska kunveno kaj diris pri tio. Unu homo ne estas organizo, sed du ja estas grupo! Eblas diri, ke ĝuste tiam la estonta SEJM-2 faris la unuan enspiron.

La persono estis Dima Oŝĉepkov (tiam loĝanto de Taŝtagol, Kemerova regiono). Mi kun Dima interkonsiliĝis kaj venis al la konkludo, ke ekzistas nur unu maniero elirigi la homojn el rutina vivpercepto kaj ekpensigi ilin pri kreado de io nova – veki ilian fantazion.

Andrej Obrezkov en 1988

En la programo de la tendaro estis anoncita nova aktivula kunveno – pri projektoj. Ni sidis surherbe, inter tendoj starigitaj meze de malalta suda arbaro kaj eldiradis plej fantaziajn ideojn pri progresigo de Esperanto kaj E-movado. Fine de la kunveno ni nomis tion "Komuna revado". Sonis rideksplodoj, fantaziaĵoj fluis rivere... Kaj jen Dima proponis sian ideon pri aĉeto de domo en Siberia tajgo, kiu povus servi kiel E-centro, renkontiĝejo... Li nomis la prezojn (malaltegajn) kaj ĉiuj entuziasmiĝis. Eksentinte la taŭgan momenton, mi anoncis, ke fari tian projekton kapablos nur teamo, kiu havos distribuitajn funkciojn – kaj nun neniu kontraŭis, ĉiuj estis por.

Jura Paseĉnikov en 1988

La diskutoj pri funkciigo de la nova organizo (jam ne pri ĝia neceso!) daŭris ene de OkSEJT-29, kiu okazis same apud Urjupinsk du semajnojn pli malfrue. En tiuj kunvenoj partoprenis Gena Basov (tiam el Tomsk), Garik Kokolija (tiam el Suĥumi), Andrej Obrezkov, Lena Lebedeva (ambaŭ el Ivanovo), Jura Paseĉnikov (Tomsk), Saŝa Malacion (tiam Slavjansk)...

En septembro la agadoj jam bolis. Gena Basov verkis kaj dissendis al E-kluboj kaj aktivuloj alvokon pri fondo de SEJM-2 (la siglon li mem inventis, kaj ekde tiam oni jam ne povis uzi ion alian); en Moskvo okazis organiza kunveno, al kiu aliĝis gvidantoj de Moskva Asocio de Junaj Esperantistoj (MAJE) Mikaelo Ĉertilov kaj Andrej Liskov; ni transprenis la gvidadon de la junulara komisiono de ASE; ni komisiis al moskvanoj organizi OkSEJT en 1989, ktp.

Saŝa Osokin en 1988

Unuvorte, ĉio iris laŭ la normala "organizkonstrua vojo", sed tiumomente venis la novaj informoj de Dima Oŝĉepkov kaj ĉio renversiĝis al iu romantikaĵo. Do, reveninte hejmen li komencis esplori pri aĉetebla arbara domo, kaj interalie vizitis la urban komitaton de komsomolo. Komsomolo en 1988 estis unu el la plej progresintaj partoj de la sovetia socia strukturo, kaj la unua sekretario de la taŝtagola urba komitato ("gorkomo") estis unu el tiaj progresuloj. Aŭskultinte Dima-n pri junaj esperantistoj, iliaj

planoj kaj revoj, la sekretario proponis unuigi niajn revojn kun la liaj.

Al Dima estis proponite iĝi la dua sekretario de la gorkomo, kaj por E-centro estis disponigita tuta bazejo – konstruaĵo de pionira tendaro, kiu vintre estis uzata kiel noktumejo por montaraj skiistoj (en la regiono de Taŝtagol – Montara Ŝorio, aŭ "Siberia Svislando", kiel oni kliŝe ĝin nomas, estas bonegaj montskiejoj; ankaŭ la naturo estas belega). Ni devis kolekti teamon, kiu transprenus zorgadon pri la bazejo kaj farus el ĝi montskiistan centron. Decidi pri tio necesis ege rapide.

Tiusomere mi estis fininta la universitaton. Dank' al subteno de la volgogradaj regionaj komitatoj de sindikatoj kaj komsomolo (nu, oni aprezis mian E-agadon kaj volis reteni en la urbo), mi ne veturis devige labori en iun vilaĝan lernejon – sed mi ne havis jam iun certan (kaj kontentigan) laborlokon.

Tial jam fine de oktobro mi kun negranda valizo aperis en Taŝtagol kaj iĝis la direktoro de la bazejo. Baldaŭ venis la tria "E-taŝtagolano" – Aleksandr Osokin (tiam el Ĉeljabinsk). Triope ni fondis Junularan Esperanto-Centron, kiu iĝis la fundamento de la nova SEJM.

Kaj mem SEJM-2 estis fondita kelkajn semajnojn pli malfrue, dum la novjara fonda konferenco. Tio estis ege feliĉa kaj amuza tempo. Inter admirindaj montoj, meze de densa arbaro kun unu-dumetra tavolo de lanuga, brilanta neĝo, en kaduka duetaĝa konstruaĵo, sur feraj litoj, ni sidis kaj diskutis pri la principoj de la organizo, preparadis ĝian statuton, verkis laborplanojn.

Turistoj demandas lokanon:
– Kie vi konsilus al ni starigi tendojn?
– Jen tie, ĉe la herbejo.
– Kaj ĉu estas ĉi tie iuj distroj?
– Jes, ĉiusemajne mi ellasas sur la herbejon mian bovon.

Responde al tute naturaj timoj pri burokratiiĝo (kiuj somere preskaŭ malebligis fondon de la organizo) estis decidite, ke SEJM-2 okupiĝos nur pri konkretaj agadoj: aranĝoj, eldonado de informiloj ks. Kaj se ĝi iam ne havos tiajn taskojn, ĝi tiam ĉesu ekzisti.

Kiam ni ne diskutis, ni havis koncertojn de krasnojarskaj E-kantistoj (ŝajne la unuan fojon ni aŭdis tiam Sergej Bozin), de Andrej Obrezkov; oni povis amuziĝi pri komputilaj ludoj (tiutempe ankoraŭ grandega novaĵo) per la komputilo, kiun venigis de sia nova laborloko Aleksandr Osokin, ktp. Kaj, kompreneble, ni skipromenis en la fabela ĉirkaŭaĵo. Kutime estis pli froste ol 20 gradoj, sed tie, en montaro, la aero estis tiom senmova, ke oni povus plene senvestiĝi kaj sunbruniĝi tage, ne sentante la froston.

Mi pensas, ke tiamaj romantikeco, amikemo kaj aliaj helaj sentoj iĝis la fundamento de SEJM-2, kiuj ebligis al ĝi ankoraŭ plurajn jarojn, dum en ĝia kerno restis almenaŭ kelkaj homoj, ĉeestintaj la fondan procezon, ekzisti vivoplene kaj aktive.

Al mi feliĉis, ke SEJM-2 ekzistis en mia vivo.

Andrej Grigorjevskij (Krasnije Ĉetai, Ĉuvaŝio)

MEMORE PRI VETERANO

La 6-an de novembro en Tiĥvin forpasis unu el plej malnovaj esperantistoj de Rusio, ekskolonelo, honora civitano de la urbo Tiĥvin, Nikolaj Nikolajeviĉ Zverev. En la komenco de ĉi jaro ni festis la 90-jaran jubileon de Nikolaj Nikolajeviĉ. Lia vivo estis elstare eventoriĉa. Li lernis Esperanton en la tridekaj jaroj, poste fariĝis fakulo pri la franca lingvo, armea tradukisto, dum la Dua Mondmilito heroe batalis, defendante la Patrolandon. Pro la gloragoj la ŝtato honoris lin per la plej alta ordeno – tiu de Lenin, per ordeno de Ruĝa Standardo, multaj aliaj ordenoj kaj medaloj. Post la milito N.N.Zverev dum multaj jaroj havis la oficon de militataŝeo ĉe la ambasado de Sovetunio en Francio. Nikolaj Nikolajeviĉ venis la E-kurson en Tiĥvin tuj post ĝia ekfunkcio en 1973, kaj restadis klubano tiom aktiva, kiom ebligis al li la multenombraj sociaj okupoj. Ni registris liajn rememorojn pri E-movado antaŭmilita kaj pri lia heroeca vivovojo.

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

REMEMOROJ DE TIĤVINA ABORIGENO

La unuan fojon mi aŭdis la vorton "Esperanto" en 1926. Al kunveno de nia junpionira taĉmento venis iu maristo, akompanata de la pionirgvidanto. Tio tre mirigis nin, ĉar en nia firmtera Tiĥvin ni neniam renkontis maristojn. Eĉ pli – la maristo surprizis nin per sia propono. Mi ĝis nun memoras lian demandon: "Geknaboj, ĉu vi volas, ke mi instruu al vi la lingvon Esperanto?" Certe, ni sciis nenion pri la ekzisto de tiu lingvo, sed ni volonte konsentis, kaj baldaŭ komenciĝis niaj regulaj lecionoj.

Dum la pionirkunvenoj oni rakontis al ni pri la maristoj, kiuj aktive partoprenis la batalojn kontraŭ malamikoj de la revolucio, defendante la Sovetan ŝtaton. Sed nia maristo tute ne similis tiujn, pri kiuj oni al ni rakontis. Li estis sufiĉe juna kaj inteligenta, plej verŝajne instruisto, kaj ege malfacilis imagi lin atakanta malamikojn kun fusilo en la manoj.

Tiutempe ni ne pensis pri tio, de kie la homo kompare juna povis posedi Esperanton, malgraŭ ke la lingvo mem en tiu epoko estis kompare juna. Tiuj ĉi lecionoj allogis min treege. Ili komenciĝis en la aŭtuno de la dudek sesa jaro, daŭris la tutan vintron kaj printempon kaj finiĝis somerkomence.

La maristo havis sian originalan instrumetodon. Veninte al la leciono li tuj alparolis nin en Esperanto, poste tradukante la diraĵon en la rusan. Tiamaniere li donis

al ni la eblecon lerni prononcon kaj memorfiksi ne nur apartajn vortojn, sed ankaŭ kompletajn esprimojn. Ni havis neniajn lernilojn: ĉiujn lecionojn li gvidis laŭmemore. Granda nigra tabulo pendis en nia pionirĉambro. Necesas rimarki, ke tiutempe okazis vasta kampanjo kontraŭ analfabeteco. Nia pionira taĉmento funkciis ĉe la akvotransporta kontoro apud la Tiĥvina kluzo, kaj vespere en nia pionirĉambro oni instruis legon kaj skribon al gemaljunuloj, kiuj loĝis en la vilaĝo Fiŝovica. Nun tiu urboparto nomiĝas Fiŝova Monto.

El la vidpunkto de la hodiaŭa tago oni povas kuraĝe aserti, ke nia maristo estis ne nur talenta instruisto, sed ankaŭ lerta psikologo. Post kiam ni komprenis kaj ekposedis la formadon de numeraloj, li enkondukis originalan praktikon. Antaŭ ĉiu leciono li skribis sur la nigra tabulo diversajn tri-kvarsignajn numerojn kaj igis ĉiun lernanton nomi la nombrojn Esperante. Tio estis siaspeca psikologia gimnastiko antaŭ la vica leciono.

Ni venadis en nian pionirĉambron al la Esperanto-lecionoj tage ĉiudimanĉe. Dum la tempo de niaj lecionoj ni sufiĉe firme ellernis bazajn regulojn de la gramatiko kaj akiris certan vortprovizon.

Nia lernado finiĝis same subite kiel ĝi komenciĝis. La vican lecionon nia instruisto ne venis, kaj nia pionirgvidanto – studento de la arbarista metilernejo en Berjozovik – anoncis al ni ke la lecionoj ne plu daŭros.

La 5-an de novembro, je la 16.30, en Moskvo, en la familio de Oĉjo (eks-Dadaev) kaj Julija Ĉajka-j naskiĝis la filo Jegorĉjo. Li masas 3,5 kg kaj longas 51 cm. La panjo kaj la bebo fartas bone. La paĉjo ĝojas kaj frenezas.

Kiu estis tiu mirinda maristo, de kie li aperis kaj kien malaperis – ni ne sciis, sed la rememoroj pri tiuj mirindaj lecionoj restis kun mi por la tuta vivo.

La duan fojon mi renkontiĝis kun la lingvo Esperanto nur post dek jaroj. En 1937 mi legis en “Izvestija” anoncon pri malfermo de korespondaj E-kursoj en Moskvo. Havante ĝeneralan imagon pri la lingvo, mi decidis aliĝi al tiuj korespondaj kursoj. Plenuminte la necesajn formalaĵojn mi estis enlistigita kiel ano de la tutlandaj korespondaj Esperanto-kursoj. Oni devis pagi por la kursoj, sed la pago estis tre malgranda, kaj baldaŭ kun la unua kontrola tasko mi ricevis grandan pakaĵon, kiu enhavis pli ol dudek broŝurojn en Esperanto, du dikajn vortarojn kaj lernolibron. Mia lernado konsistis el plenumo de kontroltaskoj, sendataj en Moskvon al la adreso: Moskvo, Spiridonovka 15. Post dek – dek kvin tagoj la kontroltasko revenis kun korektitaj miaj eraroj, pritakso kaj metodikaj konsiloj. Kun tiu kontroltasko venis la tasko por la vica leciono. Tiamaniere dum ĉiu monato mi plenumis du aŭ tri kontroltaskojn. Miaj studoj en la korespondaj kursoj daŭris ĉirkaŭ ok monatojn.

Somere de 1938 mi rericevis mian kontroltaskon. Sur la koverto oni skribis: “La adresito forveturis”. Estis la jaro de la plej teruraj stalinaj persekutoj. Preskaŭ ĉiutage la ĵurnaloj informis pri senmaskigo de malamikoj de la popolo en tiu aŭ alia institucio. Venis do la vico de la korespondaj Esperanto-kursoj. En la sama ĵurnalo “Izvestija” aperis informo, ke la malamikoj de la popolo aranĝis sian neston sub ŝildo de la Tutruslandaj korespondaj kursoj de la lingvo Esperanto. Post

tiu informo iĝis por mi klare, kien forveturis la adresito.

Ĉiu ano de la kursoj havis sian personan ĉifron. Tiutempe mi militservis en la urbo Ribinsk de Jaroslavla regiono, do mi havis la ĉifron JAR-112. Tio signifis, ke mi estis la cent dek dua korespondkursano el la Jaroslavla regiono. Mi nenion scias pri aliaj kursanoj, sed por mi la studado en la kursoj ne pasis senspure. Post la senmaskigo de tiel nomataj malamikoj de la popolo mi ricevis ordonon veni en la urban departementon de NKVD (Popolkomisariejo pri internaj aferoj). La krimesploristo havis nenian, eĉ la plej etan imagon pri la lingvo Esperanto. Li provis informiĝi, en kiu lando oni parolas tiun lingvon, kiucele mi, ruĝarmea oficiro, bezonis lernadon de tiu lingvo, kiel mi trovis kontakton kun la kursoj, kiajn presitajn informojn mi ricevadis de ili ktp. Post longdaŭra demandado mi estis pace forlasita kaj la tuta epopeo pri la korespondaj kursoj de Esperanto finiĝis por mi.

Post dek du jaroj mi denove renkontiĝis kun la lingvo Esperanto, sed jam ĉe tute aliaj cirkonstancoj. En 1950 la sorto ĵetis min al fora eksterlando, kaj tie mi eksciis, ke Esperanton oni ne nur lernas, sed ankaŭ libere uzas en aferbezonoj. Parizon ĉiujare vizitas centmiloj da eksterlandaj turistoj. Certe, ne ĉiuj ili posedas la francan, do la francaj firmaoj, priservantaj la turistojn, ĉiam havas homojn, kiuj parolas fremdajn lingvojn. Tial en la lokoj, kie oni priservas eksterlandanojn, kaj sur la pordoj de vendejoj estis legebla anonco pri la lingvoj, parolataj ĉi tie. Kaj tre ofte en la lasta linio estis la vorto "Esperanto".

Post jardekoj, fininte mian laboragadon, mi denove renkontiĝis kun la lingvo Esperanto en la sama loko, kie mi estis aŭdinta pri ĝi la unuan fojon: en mia naskiĝurbo. Mi estis agrable surprizita, kiam mi legis, ke en Tiĥvin ekzistas rondeto, kie oni lernas Esperanton. Tutcerte mi ne povis resti indiferenta kaj komencis frekventi la lecionojn en tiu rondeto. Bedaŭrinde, fine nia instruisto (temas pri M.Bronŝtejn) forveturis el Tiĥvin kaj ĉe tio finiĝis mia vizitado de la lecionoj.

Sed, memore pri miaj okupoj pri la lingvo Esperanto, jam dum sesdek jaroj en mia arkivo konserviĝis kelkaj miaj kontroltaskoj kaj dudeko da broŝuroj, ricevitaj el Moskvo en 1937.

Nikolaj Zverev
registris kaj lingve glatigis Viktoro Kandalinskij

LA FESTIVALO DE VIDEOFILMOJ EN ESPERANTO

La 15-an de novembro 2003 okazis en Maribor (Slovenio) la 6-a internacia videofilm-festivalo en Esperanto. Oni montris filmojn el Ukrainio, Francio, Britio, Brazilo, Pollando kaj Slovenio. Bedaŭrinde estis nur unu filmo en la arta sekcio kaj tial la internacia faka ĵurio (Romana Roĵiĉ el Kroatio, Juri Ĉrepinko kaj Srĝan Trifunoviĉ el Slovenio) atribuis nur premiojn en la dokumenta sekcio: 1-a premio por la filmo de Roman Dobrzynski el Pollando "Medalo de Toleremo", 2-a premio al Kevin Jones el Britio por "Balonfesto" kaj 3-a premio por "Birdoj de Ukrainio" de Odesa E-klubo.

(NUN)

De la 6-a ĝis la 9-a de novembro en la urbo Bogorodick (Tula regiono) okazis tradicia, jam la 9-a, Studa Renkontiĝo de Iniciatema Generacio (StRIGo-9), en kiu partoprenis pli 100 personoj. La temo ĉi-foje estis "Pedagogiaj ludoj". La ĉeforganizantino de StRIGo-j Irina Gonĉarova asertas, ke okazonta post unu jaro StRIGo-10 estos la lasta.

StRIGo PER LA OKULOJ DE NOVULO

Kiam mi iris al StRIGo, mi opiniis, ke estu io ajn, sed Esperanton mi neniuokaze lernos. Ne eblas diri, ke mi skeptike rilatis al la lingvo mem; simple mi decidis, ke tiuj senĉesaj lingvostudoj sufiĉas por mi. Mia amikino Oljga promesis, ke ankaŭ sen la lingvostudo estos interese. Kaj dum la unua tago mi, vere, iel traekzistis fore de Esperanto, ricevante plezuron de la programeroj kun la noto "R" (tiel en la programo estis markitaj la ruslingvaj eroj). Tamen, la prelegon de Garik Kokolija pri E-muziko jam eblas trakti kiel transiran momenton. Minimume aperis deziro kompreni, pri kio oni kantas kaj pri kio oni voĉridetas?..

la novulo

El la "R"-aranĝoj plaĉis al mi preskaŭ ĉio. Unuavice plaĉis la homoj, kiuj gvidis ilin. La knabino kun la konvena nomo Ero, rakontinta pri aromoterapio, sukcesis krei atmosferon de mistero kaj beleco. Impresis la ebleco mem haltigi sian kuron, plonĝante en pacigan kaj samtempe emocian reĝlandon de aromoj.

Ĝenerale la programo kvazaŭ speciale estis kompilita laŭ la principo "mistero": tantrismo, neŭrofiziologio de dormo, ĉinaj hieroglifoj… Kaj ĝi bonege ilustris la vortojn de tiu Oljga, kiu diris, ke la ĉefa allogaĵo de StRIGo estas ebligo elŝiriĝi el ĉiutaga rutino. Finfine, ĉiujn tiujn novajn sciojn kaj sentojn la homoj mezuras por si mem, kio faras la pedagogiajn ludojn speciale interesaj. Kaj ne tiom gravas, kiom profesiece tiuj scioj estas prezentataj.

Ekzemple, Paŝa Ardo, kiu kelkfoje dum tago okazigis siajn frenezajn teceremoniojn. Estas dubinde, ke li tre fortas pri ĉinaj hieroglifoj aŭ historio de Ĉinio, sed tiu bonanimeco, per kiu li renkontadis la homojn, kaj lia preteco respondi ajnan surprizan demandon plenplene kompensis manketojn de la informoj – kiujn malavare kompletigis la multnombraj vizitantoj.

Tamen rilate al frenezeco la teaj ceremonioj havis konkurantojn. Tantrismo… Ho, kiom da miraklaj malkovroj!.. Tio, vere, estis io… Kaj por tiuj, kiuj traktis ĉion serioze, kaj por tiuj, kiuj venis pro scivolemo. Mi persone partoprenis la programeron dufoje – kaj kun diversaj rezultoj. La unuan fojon mia partnero estis ĉarma knabino, kun kiu estis facile realigi alvokojn de la gvidanto. (Por foruloj:

temas pri iuj malstreĉaj ekzercoj, gvidantaj al komforto fizika kaj anima.) La duan fojon ĉirkaŭe formiĝis kompanio, ni diru, klaŭna, tial tantro transformiĝis al seanco de ridterapio.

prezento de la kanto "Mi diras al ŝi" de Mikaelo Bronŝtejn el la disko "Oraj kantoj – 5"

En StRIGo, kiel konate, tagoj estas multe pli longaj, ol kutime: je la oka – vekiĝo, sed la endormiĝo – nocio vastigebla… En la tagordo mem estis ekzemple hor-mencioj 24.00-26.00 kaj simile. Jen la plej taŭga tempo por psikologiaj trejnadoj: la homo jam ne tiom klare cerbumas, sed orientiĝas pli al la subkonscio. Tio ebligas eligi al la lumo kliŝojn kaj enradikiĝintajn skemojn de konduto. Kaj tio jam estas ne tiom senproblema, kiel te-gustumado kun Paŝa, kvankam, vere, utila. Ajnokaze, post similaj eksperimentoj ĉiu havas pri kio pensi, kion kontraŭi kaj pri kio konsenti…

Tamen, tempas jam rememori pri tio, kio estis antaŭe… Esperanto. Ĝis la leciono por la startuloj ĉe Sonjo mi, kiel jam estis dirite, specialan adortremon al la lingvo ne sentis. Sed de la unuaj minutoj de la studokupoj mi komprenis, ke mi ricevas grandegan plezuron! Verdire, min kaptis iu ekstazo! Certe, tion igis mem Sonjo – junulino tiom radianta, ke, laŭ mi, eĉ prelego pri hidrolizo el ŝiaj lipoj kortuŝus kiun ajn. Ĝuste kun Sonjo, kiam ni ĥore ripetadis elementajn vortojn kaj frazojn, kantis kanone, mi komprenis, ke ĉarmo de Esperanto estas en ĝia facileco kaj malfermiteco. La lingvo estas faciligita gramatike, sed tute ne malriĉa. La lingvo mem ŝajnis al mi esti malfermita al la homo kaj la mondo. Iu diros: nu, jen – ŝi malkovris Amerikon. Tio ja estas en la koncepto de Esperanto. Ĝuste pri tio temas: teoriaj scioj kaj praktiko estas aferoj, tamen, diversaj. Eblas centfoje aŭdi, sed ne signifigi la vortojn. Same mi – se mi ne trafus la lecionon de Esperanto, mi apenaŭ eksimpatius al ĝi.

la knabinoj, kiuj kreis etoson dum koncerto

Jes, simpatioj dum StRIGo ne mankis. Tial en la resuma kunveno mi sincere diris, ke pleje min impresis

ankaŭ gajaj momentoj ne mankis dum la renkontiĝo

granda kvanto de "sunaj" homoj: la homoj, kiuj elradiis pozitivan energion kaj varmon. Certe, ĉi tie indas rememori pri Frank, donacinta al la popolo maron da ĝojo kaj parencaj al ĝi emocioj. Minimume pri tiuj, kiuj dancadis sub lia atenta gvidado flamigan merengon, mi diras senhezite. Bonŝancis ankaŭ tiuj, kiuj aŭskultis liajn rakontojn pri Kolombio kaj fenomeno de Kastaneda. Mi, ve!, maltrafis ĉi tion – pro nescio de Esperanto, sed pri sincereco de alies admiroj mi ne dubas.

Evidente, eblus mencii plian vicon de nomoj, sed se hazarde tien trafos ne ĉiuj pretendantoj por la titolo "sunaj homoj", alflugantaj por StRIGo? Tial mi lasu tiun intencon kaj provu proksimiĝi al la fino… Nur mi diru ankoraŭ paron da vortoj pri la amasa piedmarŝado en la Bogorodickan arkitekt-parkan komplekson – bienon de grafo Bobrinskij. Jen do: la ekskurso estis impresa – kaj per sia informriĉeco, kaj per animeco de la ekskursgvidantino.

Kaj nun – al la finalo... Laŭ mia observo, multaj homoj konscie evitas aranĝojn, kiuj deflanke prezentiĝas kiel amasiĝo de uloj, kunigitaj per iu ideologio. Do, jen estis tre agrable vidi, ke Esperanto-ideologio kiel tia en StRIGo ne ekzistas. Sendube, estas ĉi tie siaj taskoj kaj streboj. Sed, kiel diras la organizanto Irina Gonĉarova, Esperanto dum StRIGo ne estas memcelo. Kaj, verŝajne, dank' al tio gekamaradoj kiel mi ekpovis malkovri por si Esperanton – tra aliaj manieroj komunikiĝi, kiujn donacis al ni StRIGo. Ĝuste en tio, mi opinias, kernas la ĉefa valoraĵo… Kaj poste la intereso iĝas pli profunda, kaj impresas la ebloj, kiujn liveras posedo de Esperanto, kaj tiel plu, kaj tiel plu…

Mi ne mensogu – reveninte de StRIGo mi ne ekstudis Esperanton kun avido kaj fanatikeco, kvankam la deziro estas, kaj mi plezure ekvizitadus E-kurson, se tiu komenciĝus senprokraste. Tamen mi zumadis pri Esperanto en la orelojn de la edzo, atakis kaj venkis tiujn konversaciulojn, kiuj nesenskeptike nomis Esperanton "mortnaskita lingvo", kaj krome faris pri StRIGo kelkajn radioelsendojn per mia radio, kiu emisias por la landoj de KSŜ, Orienta kaj Suda Eŭropo. Ja la materialo pli ol sufiĉis… Periode mi min kontrolas, ĉu mi ankoraŭ memoras la vortojn, kiujn ni studis kun Sonjo? Kaj ĉiufoje ĝoje konstatas: mi memoras.

Karina Ivaŝko (Moskvo), tradukis Irina Gonĉarova (Odincovo)

ĈU REALIĜOS IAM RUSIA E-TERITORIO?

Se vi memoras, en REGo № 6 (13) aperis la artikolo de V.Ĉernov pri intenco de la kalugano Petro Sjutkin krei en la vilaĝo Gorenskoje apud Kaluga multspecialan E-Centron surbaze de agrikultura farmejo. Ĉiuj dezirantoj helpi efektiviĝon de la ideo kaj samtempe ripozi en naturaj vilaĝaj kondiĉoj estis invititaj tien ĉi-somere.

Gastinte ĉe miaj eŭropaj parencoj, mi vizitis mezjulie la mastrumon de Sjutkin kaj povis konvinkiĝi, ke ĉio priskribita en la artikolo estas reala fakto. Kaj la loko estas sufiĉe pitoreska, kaj spaco por provizora dislokado de volontuloj sufiĉas, kaj la pripensitaj intencoj de la mastroj por estonteco estas plej seriozaj. Ne estis nur amasiĝo de esperantistoj en la tereno: la alvoko kunhelpi restis senreeĥa…

Petro estas altstatura viro kun nigraj lipharoj, 43-jara, kiel mi eksciis poste. Li montris al mi la tutan mastrumon, rakontis pri siaj planoj de ĝia plivastigo, konatigis kun sia pli juna kompano Aljoŝa Rajevskij, havigis al mi liton kaj nutradon. Bedaŭrinde mi estis tre limigita tempe kaj ne povis helpi ilin esence dum du tagoj: nur senŝeligis kelkajn branĉotrunkojn, alnajlis kelkajn tabuletojn kaj 2-3 fojojn purigis la stalojn (ili havis tiam unu bovinon kaj ĉirkaŭ dek gekaprojn). Sed por kompleta aranĝo de la teritorio bezonatas multaj manlaboroj, simplaj kaj komplikaj. Necesas rekonstrui unu el du altaj dudeklivaj lignaj fojnejoj por somera esperantista "hotelo", plivastigi la brutejon, falĉi herbon per benzina falĉmaŝino, ripari aŭtojn. Pli simple estas kulturi grundon, kreskigi kaj sarki terpomojn kaj legomojn, rasti fojnon, paŝti kaj melki brutaron, zorgi pri kokinoj ktp. Por konstrui novan domon anstataŭ la malnova bezonatas pli-malpli profesiaj spertuloj kun diversaj konstruaj praktikoj. Tio postulas ankaŭ sufiĉajn monrimedojn, ĉu de iu nova konstanta kompano, ĉu de ies sponsora helpo. Alie tiu vivnecesa laboro prokrastiĝos ĝis malbaldaŭa akumuliĝo de mono rezulte de vendado de laktaj produktoj.

Do, nun la potenciala E-teritorio estas ordinara evoluinta kamparana mastrumo, kiun la entreprenemaj mastroj celas transformi al produktiva kaj profitdona laktoprodukta farmbieno. Kaj nun mi vidas, ke nur nia laŭforta subteno povas plirapidigi tiun procezon, por ke ni laŭeble plej baldaŭ ricevu komunan neformalan E-centron, kian iam provis establi en Rostova regiono fama Anatolo Gonĉarov. Eble indas altiri atenton de niaj esperantistoj al la problemo dum februara REK? Nia estraro ja organizas multajn printempajn kaj somerajn aranĝojn, kaj estus tute nature, se iu forta E-klubo aŭ alia E-organizo "patronus" la bienon de Sjutkin por regule kunvenigi ĉiujn dezirantojn en Gorenskoje kaj akorde labori tie dum kelkaj tagoj por la bono de si mem kaj de la tuta rusia E-komunumo. Oni povas interkonsenti, ke ĉiu doninta sian laborforton estos poste prefera gasto en la konstruita E-teritorio.

Mi pensas, ke estas tre bona okazo por Rusia E-movado ekhavi funkciantan multcelan modelan E-Centron je proksima distanco de Moskvo. Ni subtenu la E-teritorion per enmeto de sia manlaboro kaj siaj menskapabloj, ankaŭ, povas esti, per investo de liberaj monrimedoj kiel kunagantoj de la kolektiva farmbieno!

Sed kia homo estas Petro Sjutkin interne? Ĉu ni povas fidi lin en tiu grava afero? Por kompetente respondi tiun demandon pri iu, necesas kune kun li formanĝi "pudon da salo". Tamen mi sen hezitoj povas diri, ke Petro estas bonvola, energia

kaj instruita homo, multsperta aviadteknikisto, riparisto kaj konstruisto. Krom tio li estas laŭnature scivolema filozofo kaj verkis multnombrajn publikaĵojn, inter kiuj ankaŭ miniaturan E-lernolibreton kaj vortarojn. En 1997-2001 li estis deputito de Kaluga urba Dumao, kie tre aktive instigadis la junularon al diversaj aferoj kulturklerigaj kaj ekonomiaj. Ĝuste tiam li fondis (kune kun kelkaj samideanoj) sian junularan farman lernan mastrumon por profesia kaj intelekta evoluigo kaj edukado de junaj publikaj agantoj. Ĝenerale li estas, laŭ mi, sukcesa kunfando de juneco kaj matureco, kapabla trabati vojon al praktika apliko de la internacia lingvo en nia vivo, ĉar eĉ du liaj infanaĝaj gefiloj komencas paroli Esperante. Kaj al mi ŝajnas, ke iomaj liaj subjektivaj eldiroj kontraŭ virinoj klarigeblas ĝuste per tio, ke li loĝas nun senfamilia kaj sola edukas ilin (ege sparte!)…

Vladimir Sudakov (Primorskij reg.)

MORTIS RASUL GAMZATOV

En tago nuboplena kaj malhela,
Sur la penige ŝtonkovrita voj'
Li versis, ke la vivo estas bela
Dum sun' kaj pluvo, ĝojo kaj malĝoj'.

Li montris per la kora plumkonfido
Belegon de l' rigora vivoleĝ':
Sen larmoj malaperus ankaŭ rido,
Kiel verdaĵo sen malvarma neĝ'.

En la naturo vidis li ekzemplon
De sankta pacienc' en la sufer',
Pentrante la naturon kiel templon
De la vivem', sagaco kaj esper'.

Neniam lernis mi la avarean
Kaj akre sentas nur laŭ la imag'
En liaj versoj la potencon krean
Kaj trafon de la flama vorta sag'.

Mi ĝuas en la rusa liajn versojn
Dum senkompata prem' de l' efektiv'
Kaj aŭdas altspiritajn universojn
De la mistera kaj sagaca viv'.

La multkoloraj vokoj, kantoj, sortoj
La vivon gloras per la versarom'.
Forpasis li, sed venas liaj vortoj
Al ĉiuj homoj kaj al ĉiu hom'.

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)

Bulteno de REU

RET-04

lastfoje tutlanda amasa aranĝo apud Tiĥvin okazis en 1999, ĝi estis OkSEJT-39

REU-Estraro proponis al la Tiĥvina E-klubo esplori la eblecon okazigi en 2004 apud la urbo tradician aranĝon Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET-04). La tiĥvinanoj entuziasme komencis labori kaj jam trovis taŭgan bazejon, montrinte deziron organizi la aranĝon. Post tio la Estraro decidis, ke RET-04 okazos apud la urbo Tiĥvin de la 15-a ĝis la 23-a de aŭgusto 2004.

ESPERANTISTA PARTOPRENO EN KONFERENCO DE CIVILAJ ORGANIZOJ

27-28.10.2003 en Moskvo (Konferenca centro de la hotelo "Kosmos") okazis Tutrusia Konferenco de Civilaj Organizoj, kunvokita laŭ iniciato de la Movado "Por homaj rajtoj", "Konfederacio de Laboro de Rusio", "Centro de Ekologia Politiko de Rusio" kaj kelkaj aliaj neregistaraj organizoj. Ĝin partoprenis ĉ.1000 delegitoj de diversaj neregistaraj nepolitikaj organizoj (homrajtaj, ekologiismaj, virinaj, liberaj sindikatoj ktp.) el ĉiuj regionoj de la lando. Krom plenkunsidoj funkciis 17 sekcioj kaj rondaj tabloj pri diversaj akraj problemoj de la rusia socio.

La unuan fojon en la historio Rusia Esperantista Unio oficiale partoprenis en tiaspeca granda aranĝo kiel egalrajta civila organizo (apartaj esperantistoj, certe, renkonteblis ankaŭ en aliaj aranĝoj, sed ne kiel reprezentantoj de REU). Plej aktive ĝiaj reprezentantoj partoprenis en laboro kaj diskutoj de la sekcio "Civila socio kaj problemoj de migrado, repatriado kaj ksenofobio" kaj ronda tablo "Civila socio kaj defioj de tutmondiĝo". Al la menciita sekcio estis eĉ proponita kaj disdonita re-

zoluciproponо pri signifo de Esperanto en batalo kontraŭ ksenofobio, tamen pro manko de tempo oni ne sukcesis ĝin pridiskuti (bedaŭrinde, kiel ankaŭ kelkajn aliajn gravajn problemojn koncernajn). Estis disdonitaj ĉ.350 kompletoj de diversaj materialoj pri Esperanto; en vestiblo dum paŭzoj konstante deĵoris iu el la esperantistoj, kiu respondis demandojn pri nia lingvo kaj movado.

Inter rezolucioj, akceptitaj en la Konferenco, menciindas la rezolucio de la ekologia sekcio, postulanta liberigi membrojn de la societo PORTOS (kiuj estas, i.a., esperantistoj), arestitajn pro false fabrikitaj akuzoj[1].

Nikolao Gudskov (Moskvo)

RANGLISTO KLUBA (RoKo)

Ĉu estas E-kluboj aŭ ne estas E-kluboj – jen en kio estas la demand'… Se serioze, evidente – estas, sed ilia agado estas plej verŝajne por si mem. Almenaŭ pri tio, kiel "fartas" tiu aŭ alia klubo en nia lando, estas nebula imago. Ne, tutcerte, se demandi ordinaran espon kiu pli-malpli atentas pri nia Esperanta socio, li/ŝi povas nomumi 2-3, nu eble ĝis kvin, E-kolektivojn, eble eĉ iom pritaksi, sed mi garantias, ke nenion krom kelkaj abstraktaj ĝeneralaj eldiroj vi aŭdos.

Por havi pli klaran bildon pri E-agado de kolektivoj, estis lanĉita siaspeca konkurso – Ranglisto Kluba (RoKo). En REGo kaj REU-Jarlibro 2003 (p.30-33) aperis koncernaj materialoj pri tio. Kun REGo № 2(15), 2003 estis dissendita enketilo, eĉ estis proponita speciala fonduso por premiado. Reago estas preskaŭ nula. Ne tre entuziasma respondo de Slavik Ivanov pri Sankt-Peterburga E-klubo kaj tiu de Rimma Roganova pri la E-klubo en Ĉusovoj (Perma reg.). Ĉio. Plorinda rezulto.

Estas refoja peto al aktivuloj de E-kolektivoj (kluboj, rondoj ks.) en Rusio, ĉu aliĝintaj al REU aŭ ne, bonvolu plenigi la enketilon (se vi ne havas ĝin, petu ĉe la malsupraj adresoj) kaj plej **baldaŭ** sendi laŭ oportuna por vi maniero: retpoŝte (<gecxjo@land.ru>; <gecxjo@mail.ru>), ordinarpoŝte (105318 Moskvo, a/k 57), fakse (095-4335411, kun la indiko "por Basov").

REU-komisiito pri RoKo Gennadij Basov (Odincovo)

NOVAJ REU-ALIĜOJ POR 2003

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

Moskva E-klubo "MASI-FaRo" (+1 nova aligita membro): *Gurskaja Oljga*

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Arbekova Katerina (Novosibirsk), Demjaŝev Oleg (Nabereĵnije Ĉelni), Sabirov Aleksej (Kazanj)

Rezulte en 2003 REU havis 269 membrojn, inter kiuj estas 178 individuaj membroj (inkluzive 45 dumvivajn kaj 5 familiajn) kaj 91 aligitaj membroj (apartenantaj al 8 aliĝintaj kolektivoj).

---

[1] La aserto pri "false fabrikitaj akuzoj" estas privata opinio de la aŭtoro. (La Red.)

REU-KOTIZOJ POR LA JARO 2004

50 rubloj (por eksterrusianoj – 5 eŭroj) – ***individua kotizo*** (la membrokarto, Jarlibro de REU, REU-bulteno kaj aliaj informoj de REU, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj);

1250 rub. (por eksterrusianoj – 125 eŭroj) – ***dumviva kotizo*** (ĉio la sama dum la tuta vivo);

25 rub. – ***familia kotizo*** (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj);

100 rub. + 25 rub. por ĉiu aligita membro (ne malpli ol 5; krom individuaj membroj de REU) – ***kolektiva kotizo*** (po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliaj informoj de REU por la kolektivo; la membrokartoj, voĉdonrajtoj en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj por la aligitaj membroj).

La rabatita abono de REGo por ajna individua membro de REU (inkluzive la dumvivajn kaj familiajn, sed ne por la aligitaj) en 2004 kostos 100 rublojn (por la eksterrusianoj – 12 eŭrojn). La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon post la apero de REGo (kaj tial ilia kotizo enhavis la koston de REGo) plu ricevados REGon sen aldona pago. Aliaj dumvivaj membroj (kies kotizo ne inkludis la koston de REGo) por ricevi la gazeton devos pagi ĉiujare la rabatitan abonkoston.

En la antaŭa numero de REGo vi legis pri la geedziĝo de Andrej Liskov kaj Jekaterina Jevlampijeva. Nun vi povas vidi la fotojn pri tiu interesa evento.

REJM-info

redaktas Sonjo Ŝejnina, Vitalij Malenko

INTERNACIE, JUNE KAJ KUNE!

la 60-a Internacia Junulara Kongreso, 10-17.07.2004

Ĉu indas al vi rakonti, kio estas Internacia Junulara Kongreso? Do, tiu granda freneziga festo de gejunuloj somere de la jaro 2004 okazos en la centra parto de eŭropa Rusio, en iama pionira ripozejo. La ejo estas tre granda kaj nekredeble ĉarma – multaj el vi partoprenis en OkSEJT en la jaro 2001 kaj RET en la jaro 2002. Estas granda elekto de loĝvariantoj: tendumado, grandaj multlokaj ĉambroj en lignaj domoj, hotelecaj 2- kaj 3-lokaj ĉambroj.

En la organiza teamo estas multaj jam konataj kaj novaj aktivuloj de REJM kaj REU: Nataŝa kaj Andrej Grigorjevskije, Slava Ivanov, Vitalij Malenko, Maŝa Terjoĥina, Aleksandra Fedotova, Dima Oŝĉepkov, Jekaterina Ignatjeva kaj multaj aliaj.

La programo de IJK havos tri ĉefajn direktojn:

– tema (programeroj ligitaj kun Esperanto ĝenerale, TEJO, Internacia kunlaboro);

– kultura (programeroj ligitaj kun Interkulturo, lingvoj, folkloraĵoj);

– distra (vesperaj, sportaj, amuzaj programeroj).

Antaŭ IJK okazos du paralelaj antaŭkongresoj en Moskvo kaj Peterburgo. Tuj post IJK okazos la postkongresoj en Ĉeboksari kaj Novosibirsk, laŭvoje al UK en Pekino.

Krome REJM kaj ILEI organizos jam tradician instruan OkSEJT-on (la 05-10-an de julio 2004) proksime de la loko, kie poste okazos IJK. Invitu viajn amikojn por lerni la lingvon kaj poste partopreni en IJK!

Al IJK jam eblas aliĝi. La kotiztabelon, koston de loĝado kaj manĝado, aliĝilon kaj ajnajn aliajn informojn jam nun trovu ĉe <www.tejo.org/ijk>. La aliĝkotizo por C-landoj (ĉiuj landoj de eksa Sovetio) estas: sub 20 jaroj – 5 eŭroj; 20-27 jaroj – 7 eŭroj; super 27 jaroj – 10 eŭroj (la aĝo estos kalkulata por la dato 10.07.04). Ekzistas rabato (3 eŭroj) por tiuj, kiuj aliĝos antaŭ 03.01.04, kaj malrabato (3 eŭroj) por tiuj, kiuj aliĝos post 01.05.04. La aliĝo ekvalidos post kiam LKK ricevos la plenan aliĝkotizon kaj plenigitan aliĝilon. De rusianoj la mono estas akceptata per rubloj

laŭ aktuala oficiala kurzo + 1%. La monon necesas sendi poŝtmandate laŭ la adreso 428024, Чебоксары-24, а/я 35, Тумашкову Андрею Николаевичу aŭ transdoni al li en Ĉeboksari; en Moskvo la monon akceptas Vitalij Malenko, en Peterburg – Slava Ivanov. Por sendi aliĝilojn, programproponojn kaj por ĉio cetera uzu la ĝeneralan adreson de LKK (428000, Ĉeboksari, a/ja 189, Ĉeboksara Esperanto-Centro) aŭ la retadreson <ijk@tejo.org>; kontakta telefonnumero estas (83536) 59856, por sendi SMS – (903) 3897044.

TEJO kaj REJM bonvenigas vin al IJK-2004!

REJM-KOTIZOJ POR LA JARO 2004

kaj rabatoj por IJK

Kotizo por **membri en REJM** por la jaro 2004 estas **70 rubloj** (plus 100 rubloj por REGo). Sume la jara membreco en REJM dum la jaro de rusia IJK kostas por rusianoj en REJM-aĝo **170 rublojn**. Ĝenerala politiko de REJM estas, ke *ĉiuj membroj legu REGo-n* – do, aliĝo sen abono eblas *nur* se vi klare diras, kie aliloke (en la klubo, ĉe konatoj ks.) vi legos la gazeton. Ĉiuj aliĝantoj devas trapasi **elementan REJM-ekzamenon** (aŭ A-nivelan ekzamenon de ĈALK), kion povas anstataŭi atesto de du jamaj REJM-anoj pri lingvoposedo de la koncerna persono.

Por iĝi patrono de REJM (aĝo pli ol 30) oni pagu 500 rublojn aŭ ajnan pli grandan sumon (por nerusianoj tio estas 15 eŭrojn aŭ pli). **Atentu**: REJM-anoj ĝuos rabategon dum la rusia IJK – 30 eŭroj.

REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) estas tutlanda junulara esperantista organizo, kiu kunordigas agadon en diversaj regionoj de nia lando. En la jaro 2004 la ĉefa zorgo de REJM estas Internacia Junulara Kongreso kaj internaciaj someraj E-kursoj dum la antaŭkongresa OkSEJT.

Oni povas pagi la plenan kotizon al la lokaj reprezentantoj de REJM: en **Moskvo** – Vitalik Malenko, en **Peterburg** – Slavik Ivanov, en **Ĉeboksari** – Kostik Viĥrov, en **Kostroma** – Ljoŝa Kuznecov. Se vi loĝas en alia urbo, pagu dum **REK-EoLA** aŭ transpagu **poŝte** al: *Vitalij Malenko, ul.Dugina 17 – 62, 140180 Ĵukovskij, Moskovskaja obl.*

Post la 20-a de januaro ĉiuj nepagintaj membroj de REJM estos forigitaj el la membrolisto (ankaŭ el la reta diskutejo <nur-rejm>). En 2004 ne plu eblos "promespagi" – pro la streĉa situacio kaj multaj aliaj prizorgendaj projektoj. Pagu vian kotizon nun. Post la 28-a de februaro (la lasta tago de EoLA) REJM-kotizo **plialtiĝos ĝis 200 rubloj** (kun REGo).

Por esperantistoj – ŝatantoj de SF (Sciencfikcio aŭ Fantazio, kiel malĉifras tion la iniciatinto Don Harlow) aperis nova diskutforumo. Aboni ĝin oni povas sendante malplenan retmesaĝon al la adreso <per-esperanto-SF-subscribe@yahoogroups.com>.

Eksciu, ke...

SEJM – KARA KAJ 40-JARA

Karaj SEJM-veteranoj, estimataj SEJM-aj mezaĝuloj kaj batalemaj REJM-anoj! En 2005 venos jubileo de SEJM – 40-jariĝo.

Komence de 1965 (aŭ fine de 1964) mi dissendis al 12 junaj geesperantistoj cirkuleran leteron kun la propono organiziĝi. Kaj al la fino de 1965 jam funkciis pra-SEJM, kiu havis sian organon, estraron kaj gvidanton. Por kaŝi nin de la sekureca servo mi proponis tiam la nenion-diran nomon de nia organizaĵo – "Adresaro de Junaj Aktivuloj" (AJA) (aŭ Adresaro de Junaj E-Aktivuoj – AJEA). Kaj en 1966, dum la plej unua konferenco de AJA, ekkuraĝinte, ni prenis la nomon SEJM (propono de V.Samodaj).

Mi proponas inde renkonti la jubileon kaj organizi festan-resuman E-aranĝon. Ja, la SEJM-50-jariĝon iuj el la veteranoj povas ne ĝisvivi. La aranĝon eblas organizi enkadre de E-veterana tendaro (Ivanovo) kaj/aŭ enkadre de RET. Necesus formi Organizan Komitaton, kies anojn bonvolu proponi, skribante al mi rete – <anatolog@mail.ru> aŭ poŝte – Gonĉarov Anatolo, ul.Festivaljnaja 15 – 1, Artjomovsk, 662951 Krasnojarskij kraj. Same, bonvole, sendu adresojn retajn kaj poŝtajn de ĉiuj SEJM-veteranoj, kiuj estas al vi konataj.

Anatolo Gonĉarov (Krasnojarska reg.)

TRA LA MONDO PER ESPERANTO PETVETURE

Sergej Ĉikaĉjov el la urbo Magadan faras ĉirkaŭmondan vojaĝon per Esperanto petveture. Sergej eliris el Magadan la 5-an de aŭgusto 2003 kaj jam faris pli ol 9000-kilometran marŝon nur petveturante, tute sen mono! Li jam venis al Jekaterinburg kaj planas atingi Moskvon, poste tra Kartvelio kaj Armenio – al Irako, Irano, Pakistano, Afganio, Hindio, tra la tuta Afriko. El Kab-urbo li planas veni al Suda Ameriko; tra la Centra Ameriko, Kubo – al Usono, Kanado, Alasko kaj reen al Magadan... Tra la tuta vojo li uzas helpon de Pasporta Servo.

Viktor Kudrjavcev (Jekaterinburg)

JEAĈR: AGADRAPORTO KAJ NOVA KOMITATO

Raporto de la komitato
de Junulara Esperanto Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko por 2002-2003.

En pasinta jaro en la komitato estis sekvaj personoj: Konstantin Viĥrov – prezidanto, Danil Kapitonov, Paŝa Korĉagin, Olesja Oŝĉepkova, Ljuda Maksimova, Ljuba Ĥaritonova, Olja Grigorjevskaja.

Niaj sukcesoj:

Aranĝoj: kunorganizado de LF en Kazanj kaj TERO; naskiĝtago de klubo; ATS "Formado de teamo" (decembro); NEBO-6; ATS "Instruado" – 2-foje (februaro kaj

oktobro); “Karavano” en Novoĉeboksarsk; “Karavanoj” en Ĉeboksaraj mezlernejoj №№ 46 kaj 51; la tendaro “Interkulturo” ĉe Kokŝaga; LF-8; ATS “Mi kaj mia organizo” (oktobro); konkurso pri infanaj pentraĵoj kaj ekspozicio en arta muzeo.

Partopreno (aktiva) en: la seminario “Nadeĵda”; foiro de projektoj; Festivalo de interesoj; Volgiaj renkontoj; sabatumo en centra urba parko; “Marŝo de parkoj”; OkSEJT; RET; Sporta konkurso de KDM (Komitato pri junularaj aferoj).

Klubaj aranĝoj: Tago de E-libro; Tago de Amo; leterdissendo okaze de internacia semajno de korespondado; komuna turisma marŝado dum Majaj festoj.

E-instruado: pasis kursoj de Danil Kapitonov post LF-7, Saŝa Blinov (kiu rezultigis aperon de nova klubo “Edmond Privat”), de Ljuda Maksimova; elementa kurso de Kostja Viĥrov post FdI.

Estis verkitaj la projektoj pri: tenda tendaro “Interkulturo”; jara programo “Interkulturo”; Evoluo de la Asocio (ricevis subvencion).

Eldonado: du “Artaj Kokteloj”; unu “Koktelo”; “Pasporto de la organizo”; unu “Esperantist’”.

Eksteraj rilatoj: ni aktive partoprenis en “Ronda tablo”; tenis kontaktojn kun KDM, Ekologia Amikaro, REJM ktp.; partoprenis renkontiĝon kun la prezidanto; donis multajn intervjuojn ĉe lokaj televidoj kaj radioj.

Ceteraj: estis organizita ekspozicio de E-libroj en la respublika biblioteko; la Asocio ricevis 3 diplomojn de Komitato pri junularaj aferoj; sukcese fordonis raportojn al la impostejo kaj la statistika servo; sukcese reregistris la organizon; anoj de la Asocio partoprenis en seminario pri interkulturo en Svedio kaj en trejna tendaro “Lider”. Aparte menciindas partopreno en funkciigo de Junulara E-centro.

Kaj jen kion ni ne sukcesis fari: programo “Interkulturo” por lernejoj; laboro pri retpaĝo; baptado de novuloj; Karnavalo; ATS-oj (Realigado de projektoj, Efika komunikado, Lingva Festivalo); LF en Kanaŝ; LF en Novoĉeboksarsk; jarlibro; projekto “Muzeo de mondpopoloj”; ne multis “Esperantist’”; la libroservo ne bone funkciis; ne multis “Kokteloj”; estis ne bonaj klubaj tagoj en la klubo “Ĉeno”; ĉesis la koruso; la komitato ne tre bone funkciis kaj al somero kelkaj komitatanoj fakte ĉesigis sian laboron.

Katja Burmisova

La 28-an de novembro en Ĉeboksari pasis reelektoj en Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko kaj jen estas la **nova komitato**: Katja Burmisova – prezidanto, Danil Kapitonov – vicprezidanto, Saŝa Fedotova – vicprezidanto, Sergeo Burmisov, Nadja Ĥaritonova, Anton Konstantinov, Irina Semjonova.

Sukcesojn al la nova teamo!

Konstantin Viĥrov (Ĉeboksari)

OKTOBRO, ĈEBOKSARI, LINGVA FESTIVALO

la poliglota konkurso plej similis al KGS kun la temo "Interkulturo"

Jes, la sinsekvo de nocioj, prezentitaj en la titolo, jam fariĝis tradicia por esperantistaj oreloj – el la unuaj du nepre sekvas la tria. La Lingva Festivalo (LF) okazis oktobre en Ĉeboksari jam la okan fojon. Kaj denove, kiel ĉiam, sukcese. La strukturo de la aranĝo restis preskaŭ sama, kiel pasintjare. Tial ne indas detale rakonti pri ĝi.

Unu el ĉefaj figuroj ĉi-jare estis honora gasto de la festivalo Aleksandr Melnikov el Rostov-na-Donu. Li prelegis en loka universitato, intervjuiĝis por amaskomunikiloj, ĵuriis dum poliglota konkurso, gvidis prezentojn de Esperanto kaj aliaj planlingvoj, okazigis specialan seminarion en Ĉeboksari post LF kaj faris ankoraŭ multon alian.

ili gvidis la inaŭguron

Jurij Karcev kun helpo de sia patrino – instruistino en Uljanovska lingva altlernejo – organizis kaj venigis por LF preskaŭ tridekpersonan grupon de studentoj de lingvaj fakoj. Kaj li zorgis pri ili ne nur tage, konsilante pri vizitindaj programeroj, sed ankaŭ vespere, organizante post la taga programo renkontiĝojn kun interesaj personoj en la komunloĝejo, kie loĝis ĉiuj aliurbaj gastoj.

Kaj, kiel ĉiam, entuziasme brilis okuloj de multnombraj ĉeboksaraj studentoj kaj lernejanoj, kiuj kuradis de unu prezento al la alia, de renkontiĝo kun honora gasto – al poliglota konkurso, de la vendotabloj kun libroj – al la bufedoj kun manĝaĵoj. Ĉio estis kutima – kutime bonega. Tiuj tri tagoj de vendredo ĝis dimanĉo traflugis kiel unu granda festo. Dankon al la ĉeboksaranoj! Ĝis la revido en sekva oktobro!

Garik Kokolija (Moskvo)

KIEL FUNKCIAS ESPERANTO EN SOĈI

Nia Soĉi-a E-klubo "Laro" havas konstantan ejon jam dum 31 jaroj en la centra Kulturdomo, tre proksime de la busa kaj fervoja stacidomoj. Sur ekstera muro de la Kulturdomo estas konstanta anonco pri la kursoj de internacia lingvo Esperanto. Ni kunvenas ĉiun dimanĉon! La ejo de la klubo "Laro" estas en nia dispono tutan dimanĉon, sed ni okupas ĝin nur de la 12-a ĝis la 20-a horo. Kaj la tempo estas dividita je tri ĉefaj partoj: 12.00-14.00 – komencantoj, 14.00-16.00 – progresantoj, kaj de la 16-a ĝis ∞ – ceteraj esperantistoj-babilemuloj. Ja mi havas ŝlosilojn de la enirpordo kaj povas resti en la Kulturdomo eĉ tutan nokton, se bezonatas.

La Kulturdomo estas municipa kaj havas multegajn plej diversajn rondetojn kun salajrataj gvidantoj. Ankaŭ mi estas oficiala instruisto de Esperanto kaj ricevas (kvankam minimuman, tamen) salajron ĉiumonate. Pro tio oni postulas de mi laborplanon pri funkciado de E-grupoj por tuta jaro, raportojn pri la kunvenoj, prelegoj, koncertoj. Kaj ni organizas tion de tempo al tempo en ĉefa halo de la Kulturdomo (300 sidlokoj). Ni regule organizas solenaĵojn ankaŭ en la kafejo "777" de la Kulturdomo. Ankaŭ Zamenhof-tagon ni festos en la kafejo la 14-an de decembro.

Ni plezure akceptos vin gaste. Ni organizos por vi tranoktadon dum bezonata por vi tempo, ni montros al vi nian ĉarman ripoz- kaj kurac-urbon Soĉi, la solan restintan ripozejon en la subtropika zono de nia lando, kie konstante funkcias E-klubo ekde 1963! Ne ĝenu, sed venu! Ni faros ĉion eblan por ke vi ne enuu en nia urbo kaj ties ĉirkaŭaĵoj – Kaŭkaza montaro, ni organizos por vi ekskursojn tra la urbo kaj montaro, eĉ al Abĥazio kun la famaj Gagra, Picunda, lago Rica, Suĥumi, kavernoj en Novij Afon kaj tiel plu. En niaj vicoj estas bonegaj ĉiĉeronoj kaj ekskurs-gvidantoj, kiuj montros al vi belaĵojn de nia subtropika naturo.

> La japanoj manĝas malmultajn grasaĵojn kaj suferas malpli da kormalsanoj ol la britoj kaj usonanoj. La francoj manĝas multajn grasaĵojn kaj suferas malpli da kormalsanoj ol la britoj kaj usonanoj. La italoj drinkas multe da vino kaj ankaŭ suferas malpli da kormalsanoj ol la britoj kaj usonanoj. KONKLUDE: manĝu aŭ drinku ion ajn. Tio, kio mortigas, estas paroli la anglan. ***(esperanto-anekdotoj)***

Bonvenon! Bonvenon! Bonvenon! Nia adreso: Esperanto-klubo "Laro", Soĉi, str.Gorjkogo 85, dua etaĝo; telefonnumero (8622) 621347; poŝta adreso: 354000 Soĉi, p/k 913; retadreso <laro@sochi.ru>.

Kiu ankoraŭ povas fanfaroni pri oficiala instruisto de Esperanto? Mi volus konatiĝi kun la kolegoj por interŝanĝi sperton de kluba agado, interkomuniki planojn de laboro kaj tiel plu. Mi serĉas samsortanon, kiu regule, eĉ kvazaŭ monotone, dum jaroj aŭ jardekoj fosas sian sulkon kaj tiras ĉaron de malfacila, foje eĉ abomena, sed ege bezonata laboro de Esperanto-instruisto, sen kio ne eblas kresko de niaj vicoj. Sen tiu laboro ne povas progresi ajna socio.

Do, ne kaŝiĝu, karaj kolegoj, prezentu vin, por ke mi ne aspektu kiel lasta dinosaŭro sur landa mapo de E-instruado. Reeĥu!

kun plej amikaj salutoj kaj bondeziroj Vladimir Bespalov (Soĉi)

TJUMENA E-KLUBO “REVO” FESTIS 30-JARIĜON!

En tjumena Esperanta vivo okazis evento: la 30-jara jubileo de la E-klubo “Revo”. La tjumenanoj decidis organizi renkontiĝon, dediĉitan al la festo. La gastoj venis el Jekaterinburg kaj Novosibirsk. Nin agrable surprizis bonkvalita organizado de programeroj. Dum la unua tago ni partoprenis en la klubkunveno, kie konatiĝis kun tjumenaj esperantistoj. Prezidanto de la klubo estas Pavel Veselov, la kursojn gvidas Galja Sarapulova – lernantino de la 11-a klaso.

Dum la dua tago ni ekskursis, kaj mi volas danki Irina Buktimirova pro preparado en Esperanto de la ekskurso al geologia muzeo. Krom tio ni ekskursis al la lago Andrejevskoje, apud kiu situas arkeologia muzeo. Ne kredu al tiu, kiu diros al vi, ke en Tjumenj ne estas vidindaĵoj. La urbo havas 417-jaran historion, kaj ni ŝatis ĝian arkitekturon. Por ekzemplo: ĉu en via urbo estas piedira ponto? Ĉu estas loko de ĉiuj amantoj?

La tria tago estis festa. Organizantoj servis por la gastoj apetitan tablon kaj organizis por ni malgrandan koncerton. En ĝi partoprenis ankaŭ la jekaterinburganoj. La oficialan parton gvidis Aleksandr Kalaŝnikov. La etoso estis bonega. Krom junuloj venis malnovaj spertaj esperantistoj – Iren Kirina, Nataŝa Korĵenkova, Marat Faĥrutdinov, Nadeĵda Ŝeveljova.

Sur la foto vi povas vidi novajn fortojn de tjumena E-klubo, ili mendis por si T-ĉemizojn kaj kaskedojn, por la gastoj – skribilojn kun simbolo de sia klubo. Mi dankas en la nomo de ĉiuj gastoj la tjumenanojn pro bona organizado de la festo, pro la bona etoso (ili blovis multajn verdajn balonetojn, pentris barilon por skribaĵoj kaj gazeton pri sia klubo, gluis steletojn al vestaĵoj).

Iom da impresoj pri la tjumena

klubo. En la klubo aperis multe da komencantoj, multe da gitaristoj. Ira Buktimirova antaŭ 7 monatoj venis al la Novosibirska EoLA tute ne sciante ludi gitaron, sed nun koncertis kaj belege kantis. Tjumenanoj eĉ tradukis kanton el la rusa kaj faris ĝin himno de sia klubo. Mi kredas, ke en Siberio aperis novaj fortoj de E-movado.

gasto el Novosibirsk Katerina Arbekova

ĈIELARKO DE LINGVOJ EN ODESSA

La 22-23-an de novembro 2003 okazis la 2-a Lingva Festivalo "Ĉielarko de lingvoj". La Festivalon organizis Odesa junulara Esperanto-klubo "Verdaĵo" kun helpo de Junulara departamento de la Urba Konsilio. Estis prezentitaj 18 lingvoj: araba, bulgara, ĉeĥa, Esperanto, germana, greka, hinda, hispana, itala, japana, kartvela, latina, persa, pola, rumana, rusa, ukraina, vjetnama; krome okazis rakonto pri lingva politiko de Svislando. Preskaŭ ĉiuj lingvoj estis gepatraj por la prezentantoj. La prezentadoj okazis en unu el la plej belaj malnovaj palacoj de Odessa – Palaco de infanoj kaj lernantaro, iam palaco de grafo Voroncov. Por la festo, la muroj estis ornamitaj de infanaj desegnaĵoj kaj aforismoj pri lingvoj kaj lingvolernado.

Honoraj gastoj de la Festivalo estis: Konsulo de Rumanio en Odessa Kornel Georgiaŝ; estrino de Junulara departamento de la Urba Konsilio Irina Semiŝkur; estroj de naci-kulturaj asocioj: kartvela, greka, persa, rusa; katedrestroj de fremdaj lingvoj de odesaj universitatoj.

Kiun sekson havas komputilo?

Viroj opinias, ke ĝi estas inseksa, ĉar apenaŭ aĉetinte ĝin, oni devas konstante elspezadi duonon de la salajro por diversaj akcesoraĵoj.

Virinoj opinias, ke ĝi estas virseksa, ĉar apenaŭ aĉetinte ĝin, oni komprenas, ke indus iomete atendi kaj ekhavi pli bonan modelon.

Dum buntaj lingvoprezentadoj la spektantoj povis konatiĝi ne nur kun la lingvoj, sed ankaŭ kun naciaj kostumoj kaj flagoj de koncernaj landoj, kun ties naciaj muzikiloj (kaj eĉ mem provi ludi ilin!), manfaraĵoj, infanaj ludiloj; spekti videofilmojn, fotojn, ĝui diversnaciajn kuirartojn... En la Palaco vere brilis Lingva Ĉielarko!

La unua tago finiĝis per Ronda Tablo, kie la organizantoj kaj reprezentantoj de la lingvoj en varma amika etoso, ĉe la tablo kun diversnaciaj manĝaĵoj, interŝanĝis opiniojn pri la ĵus okazinta Festivalo kaj ideojn por la sekva. Reprezentantino de Italio, gast-profesorino de Odesa Nacia Universitato Rossana Lecchesi demandis, ĉu ĉie en Ukrainio estas tia granda intereso pri la lingvoj aŭ nur en Odessa. Ni supozas, ke Odessa ekde la fondiĝo estis internacia urbo, kaj tiun tradicion ĝi konservas ĝis nun.

En la dua tago, dimanĉe, okazis poliglotaj konkursoj de lernejaj kaj universitataj teamoj. En Odessa ekzistas pli ol 150 lernejaj kaj universitataj teamoj, kiuj partoprenas Intelektajn Ludojn. Do, ne mankis partoprenantoj de niaj konkursoj; konkuris 2 lernejaj kaj 7 studentaj teamoj. Gajnis la teamoj "Gazonokosilka" el la lernejo № 121 kaj "Barmaglot", formita el studentoj de kelkaj odesaj universitatoj. Estas agrable, ke kiam dum aŭd-konkurso sonis fonogramoj de E-aj kantoj, preskaŭ ĉiuj teamoj ĝuste divenis la lingvon.

Kaj kronis la Lingvan Festivalon granda Internacia koncerto, en kiu dancojn, kantojn, skeĉojn, poemojn prezentis niaj eksterlandaj amikoj, anoj de soci-kulturaj societoj de Odessa – studentoj, lernejanoj kaj eĉ 5-jaraj infanoj el la germanlingva infanĝardeno ĉe la societo "Bavara Domo".

Pri la Festivalo raportis 4 odesaj televidkanaloj, FM-radikompanio, kelkaj lokaj gazetoj. Vizitis ĝin ĉ.200-250 personoj.

Tatjana Auderskaja (Odessa, Ukrainio)

BONVENON AL BILBAO EN 2004!

En 2004 la 6-a Esperanta Eŭrop-Unia Kongreso okazos en Hispanio, de la 25-a ĝis la 29-a de aŭgusto. La elektita urbo estas Bilbao, kiu troviĝas en la norda parto de la lando kaj estas la ĉefa urbo de la hispana aŭtonoma regiono Eŭskio. La kongreso ne povus okazi en alia pli taŭga loko, ĉar ĝia temo estos "Eŭropa unuiĝo: Esperanto por multlingva mondo", kaj en Bilbao oni ĉiutage vivas en dulingva medio, kie estas uzataj la hispana (kastilia) kaj la eŭska lingvoj. La eŭska lingvo estas pralingvo kun nekonata origino.

Alia kialo por viziti la urbon estas la longa tradicio de la Esperanta Klubo en Bilbao, kiu estis fondita en la jaro 1906. Dum la Hispana Intercivitana Milito (1936-39) kaj la diktatora periodo de generalo Franco Esperanto estis malpermesata en la tuta lando. Tamen, la movado daŭris sekrete kaj tiel sukcesis renaskiĝi en la jaro 1953. Ekde la jaro 1957 la Esperanta Klubo de Bilbao havas sian fiksan sidejon en la malnova parto de la urbo, en kvartalo nomata Casco Viejo. Ankaŭ troviĝas en Bilbao strato nomata Esperanto. Nun la Esperanta Klubo de Bilbao havas preskaŭ 100 membrojn.

De la 28-a ĝis 31-a de majo 2004 okazos la 81-a Germana Esperanto-Kongreso en la bela meklenburga urbo Neubrandenburg. Informilo kaj aliĝilo troveblas ĉe <http://www.aliaflanko.de/bavelo/81_GEK/gek81.php>. Por virtuale konatiĝi kun la kongresa urbo, vizitu <http://www.aliaflanko.de/urbo/neubrandenburg/>. ***(NUN)***

Krom la prelegoj atendos vin kultura programo kun teatraĵo, muzikkoncertoj, ekskursoj ktp. Por junuloj ni speciale organizas apartan programon, inter alie ni bonvenigas JoMo el Francio. Por tiuj partoprenantoj, kiuj havas eĉ pli da tempo resti en Bilbao, indas mencii, ke iom antaŭ la komenco de nia kongreso kaj dum ĝi okazos la plej grava somera festo en Bilbao, nomata Aste Nagusia (Granda semajno). Dum la dektaga festo Aste Nagusia oni povas pli bone konatiĝi kun la eŭska kulturo. Kutimaj partoj de tiu festo estas gastronomiaj konkursoj, tipaj eŭskaj sportkonkursoj, inter aliaj la famkonata internacia konkurso pri fajroarto kun profesiaj fajroartistoj de la tuta mondo.

Tiuj homoj, kiuj malŝatas la tro varman veteron, dum la aŭgusto povas trankviliĝi, ĉar Bilbao havas mildan klimaton kun someraj temperaturoj, kiuj malofte superas 30 gradojn. Tamen sur la Kantabria marbordo pluvo oftas dum la tuta jaro kaj la vetero en la urbo ŝanĝiĝas facile.

Laŭ la adreso <http://www.geocities.com/esperantobilbao/eue.htm> bonvolu viziti nian hejmpaĝon por ricevi pliajn informojn.

AROMA JALTO – 2004

la tradicia lingva Esperanto-festivalo

Jalta printempe estas io eksterordinara. Vekiĝanta montaro, verdiĝanta arbaro, freŝaj herboj, aromoj de floroj kaj la senlima blua Nigra maro. Muĝado de ondoj, forkurantaj al horizonto, varmaj ŝtonetoj kaj la printempa karesa suno, varmiganta la animon kaj la koron. Jalta printempe estas renkontiĝejo de geamikoj, kiujn kunligas komuna lingvo, similaj interesoj kaj frateca etoso. Jalta printempe estas paradizo sur Tero, kiu vizitendas, almenaŭ unufoje dum la vivo.

Loko: Krimeo, Jalta – la plej populara kaj fama kuracloko de Ukrainio.
Tempo: 01–09.05.2004, sed la tago de alveno estas 30.04.
Loĝado: en 5-litaj ĉambroj kun lavabo, duŝejo kaj necesejo; por civitanoj de eks-Sovetio – kontraŭ 3 eŭroj diurne.
Nutrado: memstara aŭ en la sama ripozejo 3-foje tage kontraŭ 3,5 eŭroj.
Programo: enkonduka seminario por eduko de Cseh-metodaj instruistoj; lingvaj diversgradaj kursoj; Universitato; ekskursoj, piedmarŝoj; koncertoj; KGS; intelektaj ludoj; lignofajroj…
Lingva ordo: tradicie severa. Nulaj komencantoj ne estas akceptataj. Dum la registrado Vi devas respondi simplajn demandojn.
Aliĝkotizo: por rusianoj – 6 eŭroj antaŭ 01.03.2004 aŭ 10 eŭroj surloke. Kontribuantoj al la programo havas rabaton laŭ interkonsento.
Organiza komitato: Volodimir Hordijenko (Kievo; ĉefor-ganizanto, loĝado, financoj, sportaj aranĝoj); Eva Bondar (Pollando; enkonduka seminario por eduko de Cseh-metodaj instruistoj); Alisa Boĵko (Kievo; instruado por komencanta grupo); Oleg Pokotilo (Kievo; instruado por paroliga grupo); Pavel Moĵajev (Jalta; instruado por perfektiga grupo, servo de lingva sekureco, koncertaj programeroj); Aleksandr Koval (Gomel; aktualigo de la retpaĝo, koncertaj programeroj, Universitato); Vjaĉeslav Katin (Jalta; piedmarŝoj, lokaj zorgoj); Miĥail Ĵdanov (Jalta; ornamado, artaĵoj); Jelena Snegirjova (Jalta; ekskursoj); Katerina Semjonova (Berdjansjk; interkona vespero, KGS); Jefim Zajdman (Jalta; historia vespero).

Gemaljunuloj en la lito. Ŝi:
– Estis tempo, kiam vi tenere tenis mian manon antaŭ la ekdormo...
Li moviĝas kaj ektenas ŝian manon.
– Estis tempo, kiam vi kisis mian frunton antaŭ la ekdormo...
Li turniĝas kaj kisas ŝian frunton.
– Estis tempo, kiam vi mordetis mian kolon...
Li leviĝas kaj surmetas la pantoflojn.
– Kien do vi?
– Por la dentoj...

La aliĝilon kaj aliĝkotizon bonvolu ĝis la 1-a de marto 2004 sendi al Volodimir Viktoroviĉ Hordijenko: p.k.35, Kiev-133, UA 01133. Por ricevi pliajn informojn bonvolu uzi la retpoŝtadreson <volodimir_h@ukr.net>, la telefonnumeron +38-044-2951701, la retpaĝon <www.aromajalta.by.ru>. Bonvenon!

LA 26-A ĈEBALTA ESPERANTISTA PRINTEMPO

Mielno, Pollando, 15-23.06.2004



Pola Esperanto-Asocio (Filio en Koszalin) invitas al la 26-a ĈEP kun riĉa kaj varia E-programo, kiu antaŭvidas interesajn prelegojn kun videofilmoj, konkursojn kun valoraj premioj, ekskursojn al vizitindaj lokoj, ĉiutagan kantadon, dancadon kaj lingvoperfektigadon. En Mielno ĉiu havos sufiĉe da tempo por agrable promeni kaj sunumi, ankaŭ sur la proksima naturista strando. Eblas naĝi ne nur en la maro, sed ankaŭ en du tegitaj naĝejoj kun varmigata marakvo. Esperantistoj el diversaj landoj havos okazon prezenti propran programon. Ni petas kunporti al Mielno diversajn esperantaĵojn, sonkasedojn kun belaj kanzonoj, E-videofilmojn, ktp. Estas planata eta aŭkcio de esperantaĵoj.

La aranĝo okazos en la ripozcentro, konsistanta el duetaĝaj domoj kun sunterasoj. Loĝado – nur en dulitaj, bone ekipitaj ĉambroj kun propraj lavujoj, eblas saŭni, bilardi, kafumi ktp. Surloke troviĝas: belega manĝejo, kunvenejo, diskotekejo, eta bufedo kaj florornamita korto kun multaj sidlokoj por ripozi, babili kaj kanti.

Partoprenkotizo inkluzivas oportunan loĝadon, bongustajn manĝojn, kongresajn materialojn kaj riĉan Esperantan programon, sed nenian sanasekuron. Por la rusianoj la kotizo estas 130 eŭroj kaze de aliĝo antaŭ 30.03.2004.

La aranĝo impresos vin forte pro neripetebla esperantista etoso kaj riĉa E-programo. Ĝi donos al vi bonegan okazon por profundigi vian lingvokonon, ligi novajn amikajn kontaktojn kaj agrable pasigi la tempon ĉe la Balta Maro.

Por aliĝi aŭ ekscii pliajn detalojn oni povas kontakti ĈEP-organizantojn letere (Pola Esperanto-Asocio, box 30, 75-016 Koszalin-1, Pollando), telefone (+48-094-3404563 – petu s-ron Baranowski) aŭ rete (<barslavo@poczta.onet.pl>, <barslavo@wp.pl>).

PRI LA XIV-a KONGRESO DE UkrEA

La UkrEA-prezidio informas, ke de la 31-a de oktobro ĝis la 02-a de novembro 2003 okazis la vica, XIV-a Kongreso de UkrEA. Konforme al la kongresa programo okazis:

– kunveno de Esperanto-instruantoj (ULEI-kunsido);
– raportoj de antaŭa prezidanto, prezidio, KRK kaj takso de ilia laboro;
– elekto de “ESPERANTISTO DE LA JARO 2003”;
– prezento kaj pridiskuto de la prezidantkandidataj programoj;
– elekto de la prezidanto, prezidianoj kaj KRK-membroj por nova elektoperiodo;
– prezento de UkrEA-strategio por nova elektoperiodo;
– pridiskuto kaj akcepto de pluraj gravaj decidoj (pri la Statuto, kotizoj k.a).

Antaŭ kelkaj jaroj prezidio de UkrEA lanĉis konkurson “Esperantisto de la jaro”. Ĉi-jare laŭ la nominacio pro fruktodona kaj aktiva laboro en instru-metodika agado estis elektita Nina Daniljuk – diplomita E-instruisto, docento, kandidato de filologiaj sciencoj el la urbo Lucjk. La prezidio sincere gratulas s-inon N.Daniljuk okaze de tiu evento kaj deziras al ŝi sukcesojn, multajn fortojn, sanon, deziron plu

plenumi noblan taskon – instruadon de la Lingvo Internacia, novajn atingojn en ŝia malfacila kaj vere komplika laboro – instru-metodika agado.

Aŭskultinte la raportojn, la delegitaro decidis taksi laboron de antaŭa prezidanto, prezidio kaj KRK kontentiga. Estis fiksitaj apartaj mankoj kaj certaj atingoj en la laboro. Aparte la delegitaro alte taksis laboron de la instru-metodika fako gvidata de N.Daniljuk.

Estis elektitaj novaj membroj de gvidaj kaj kontrolaj organoj de UkrEA. La delegitaro elektis novan UkrEA-prezidanton. Tiu estas Aleksandr Krasuckij (Kievo). La aliaj membroj de la novelektita prezidio estas: Nina Daniljuk (Lucjk), Aleksandr Griŝĉenko (Lugansko), Mikaelo Lineckij (Kievo), Ĵenja Zvereva (Kievo).

En la kontrol-revizian komisionon (KRK) estis elektitaj: Aŝot Abraĥamjan, Svetlana Pogorelaja, Oleg Pokotilo (ĉiuj – Kievo).

La 2-an de novembro okazis (far la novelektita prezidanto) prezento de proponata UkrEA-strategio por la sekva elektoperiodo. Laŭ tiu la Asocio ĉefe planas agi duflanken: "eksteren" kaj "internen". Sub nocio "agado eksteren" estas komprenataj: konatigo de ukrainia socio pri internacia lingvoproblemo kaj la vojoj de ĝia solvo helpe de internacia lingvo Esperanto, prezento de la lingvo mem kaj ĝiaj ebloj en internacia komunikado, instruado kaj helpo en memstara lerno de la Lingvo Internacia, asisto en praktika uzo de Esperanto en internaciaj rilatoj. Agado "internen" antaŭvidas: kunsolidarigon de ĉiuj ukrainiaj esperantistoj; daŭrigon de ĉio bona, kio estis atingita de la antaŭuloj; kreon de kondiĉoj por fruktodona kaj sukcesa laboro al ĉiuj, kiuj strebas kaj volas labori, efektivigon de ajna laŭpova helpo al tiuj, kiuj bezonas tiun helpon en sia agado.

Sperta hotelservisto al juna purigistino:

– Nia laboro estas delikata. Foje mi eniris neŝlositan ĉambron por ordigi la duŝejon, sed tie estis nuda sinjorino. Mi ŝajnigis min malbone vidanta kaj diris: "Pardonu, sinjoro". Jen tio estas la delikateco.

Sekvatage la junulino venas al la mentoro plenlarme:

– Oni min maldungas... Nur pro vi!

– Kio do okazis?

– Mi venis por ordigi iun ĉambron, kaj tie viro kun virino estis amorantaj. Do mi, kiel vi instruis, diris: "Pardonu, ĝentlemanoj".

La kongresanoj konstatis, ke la aktuala UkrEA-Statuto malnovas, estis kreita en sovetia tempo, ne respondas nuntempajn bezonojn. Al la delegitaro estis prezentita projekto de nova UkrEA-Statuto, kiu estis publikigita en ekstervica (novembra) numero de "Helianto". La delegitaro decidis akcepti ĝin kiel bazan principaron por kompilo de definitiva varianto. La Kongreso kreis laborgrupon (komisionon), kiu devas organizi laboron por finfari la Statuton, kolekti opiniojn, kritikojn, proponojn kaj rimarkojn de ĉiuj interesitoj, resumi ilin kaj prezenti al esperantistaro de Ukrainio. Bonvolu sendi viajn ĉi-temajn leterojn al la nova ret-adreso de UkrEA <ukrea@ukrti.com.ua>, aŭ al la poŝta adreso de UkrEA-prezidanto A.Krasuckij (str.Kotovskogo 27 – 13, UA-04060 Kievo, Ukrainio), kiu gvidas tiun laboron.

La delegitaro decidis, ke por la jaro 2004 la dimensioj de aliĝ- kaj jarkotizoj

restos: aliĝkotizo – 25 grivnoj, jarkotizo – 5 grivnoj. La XIV-a kongreso konfirmis la decidon de la XII-a kongreso pri nepago de la aliĝkotizo dum aliĝo al UkrEA por eks-membroj de URF ASE.

UkrEA-prezidio

LINGVA FORUMO EN KAZANJ: SUKCESO EVIDENTAS!

Kiom da homoj en Kazanj scias pri Esperanto? Nun tiu kvanto pligrandiĝis almenaŭ je 200 personoj dank' al la okazinta la 21-22-an de oktobro Lingva Forumo. Ĝi pasis en la urba gimnazio № 3 kaj konsistis el scienca konferenco (1-a tago) kaj lingva festivaleto (2-a tago). Aparte rimarkindas, ke organizis ĉi aranĝon Tatara-Japana Kultura centro "SAKURA", kiu volonte kunlaboras kun esperantistoj (ĝi grave kontribuis al la pasintjara LF en Kazanj kaj al ĉi-jara 8-a Ĉeboksara LF).

Do, entute estis prezentitaj 15 lingvoj, ĉiu 6-foje. Partoprenantoj de la festivaleto estis plejparte gelernejanoj, liberigitaj de kutimaj lecionoj. Sed, kvankam ilia partopreno estis "deviga", montrita de ili ekinteresiĝo pri E-o ŝajnis vere sincera kaj aŭtentika.

Al teamo de Kazanaj esperantistoj sub gvido de Sergeo Demjanov multe helpis du germanoj: Britta Loose kaj Rene Mannerof, alvenintaj en Kazanj por du tagoj el Ĉeboksari tuj post sukcesa partopreno en tiea LF.

Mi opinias, ke kune ni sukcesis kapti atenton de la ĉeestantaro pri nia lingvo. Dum 30 minutoj de prezentado ni konvinkis aŭskultantojn per propraj spertoj pri tio, ke E-o estas lingvo facila kaj uzinda, kaj esperantistoj estas popolo gaja kaj komunikiĝema. Ni montris, ke E-o utilas dum vojaĝoj eksterlanden (Pasporta Servo – ĉefa argumento), kaj rakontis pri niaj aventuroj en aliaj landoj: Ĵenja Voskresenskaja – pri Germanio, Lena Puzankova – pri Italio, Julija Sabirova – pri Finnlando.

Sed ĉefa estas, ke E-o povas ŝanĝi onin mem je pli bona flanko kaj havigi novan sintenon al la mondo. Laŭ mi tio sufiĉas.

Julija Sabirova (Kazanj)

LIMERIKOJ

Unu person' el Kievo
Longe dronadis en revo.
Poste li revekiĝis,
Kaj terure timiĝis,
Ĉar okazis al revo la krevo.

Iu knabin' el Odeso
Falis en am' sen permeso.
Ŝi suferis kaj ĝuis,
Kun pasi' rendevuis,
Sed finiĝis ja ĉio per ĉeso...

Tatjana Auderskaja (Odeso, Ukrainio)

la verda KoRo

kultura revuo

EL MALPROKSIMA HELO



Aperis nova disko el la serio "Oraj kantoj" – "El malproksima helo". Ĝi estis registrita en julio 2003 en la moskva muzikeldonejo "Muzprom" kaj enhavas 24 kantojn: *El malproksima helo; Babelturo; La danco ĉe la fajro; Kaj tiel plu; Marĝanĝa; Hoj, knabino, bruas haj; Revis mi pri forir'; Se vi ne ekzistus plu; Kanto de krokodilo Geĉjo; Tendara tvisto; Krokodilo; Terpomo; Mi pace iris kun amik'; Kafo; La vojo; La Espero; Mia kara amik'; Glori; Amazonka; Klementajn'; Ĉokolado; Radio verda; Ĉe kafotablo; Pri l' temp' pasinta memor'.*

Entute en la serio aperis jam 5 diskoj: "Oraj kantoj – 1. Ni renkontiĝos", "Oraj kantoj – 2. Amata lando", "Oraj kantoj – 3. La lingvo por ni", "Oraj kantoj – 4. El malproksima helo", "Oraj kantoj – 5. Mia nomo ne gravas". Por la rusiaj esperantistoj la diskoj aĉeteblas en la Libroservo de REU. Gesamideanoj el aliaj landoj povas akiri ilin en la Libroservo de UEA.

LUDMILA JEVSEJEVA (1913-1980)

Ludmila Ivanovna Jevsejeva naskiĝis 14.08.1913 en Rigo, kie loĝis la tutan vivon – krom la 15-jara periodo de ekzilo – kaj kiun tutkore amis. Jam en 1929, en la rusa Lomonosova gimnazio (ekzistis tiaj tiam en Latvio!), de sia instruisto Gennadij Tupicin ŝi eksciis pri Esperanto kaj ĝin eklernis. En la 1930-aj jaroj ŝi multe aktivis en latvia E-movado, i.a. redaktis la revuon "Ondo de Daŭgava".

Junie de 1941 ŝi estis arestita kaj sendita al norda koncentrejo. Nur en 1957 venis rehabilito pro manko de iuj krimagoj kaj reveno al Rigo, kie ŝi oficis en scienca instituto kaj denove komencis sian E-agadon. Mortis Jevsejeva la 28-an de

januaro 1980, subite falinte surstrate…

Jevsejeva ekverkis en Esperanto en 1933; ŝiaj poemoj aperadis en "Litova Stelo", "Pola Esperantisto", "Ondo de Daŭgava" kaj eĉ "Literatura Mondo", eniris la antologion "Naŭ poetoj" (1938). Post reveno el la ekzilo ŝiaj poemoj aperadis en "Norda Prismo", "La Suda Stelo", "La Praktiko", "Juna Amiko" kaj aliaj gazetoj. 11 poemoj eniris "Esperantan Antologion" (1984), kompilitan de William Auld, kio ja estas tre alta honoro por ajna poeto. En 1987 multaj ŝiaj poemoj estis kolektitaj en la libreto "Versoj", eldonita en Ĥarkovo.

Ŝia poezia talento estas senduba, en pluraj ŝiaj poemoj ĉeestas profunda lirikismo, tamen la ĉefa merito de Ludmila Jevsejeva estas tio, ke ŝi grandparte verkis poemojn por infanoj – ŝajnas, pli multe (kaj ankaŭ pli bone) ol kiu ajn alia esperantlingva poeto. Kiel klasikulo de tiu ĝenro en nia poezio, ŝi neniam estos forgesita. Kaj kiam iuj esperantistaj gepatroj serĉos ion por eduki siajn infanojn en esperantista etoso, oni nepre uzu ŝiajn porinfanajn poemojn.

Nikolao Gudskov (Moskvo)

MI FOLIUMAS LIBRON DE LA VIV'

Mi foliumas libron de la viv'.
Ne trovas lokon en la kor' riproĉoj,
Sufiĉa ĉio – suno kaj mallum',
Rikanoj siblaj kaj amikaj voĉoj.
Min vestis rob' el silko kaj katuno.
Post la honor' min superverŝis koto.
Pereis amo, ne pereis mi.
Versemon paralizis sent'-bojkoto,
Sed nigran muton tamen venkis plum'.
Post renaskiĝ' mi spiras pli libere,
Ne gravas, ke frizaĵo grizas nun,
Mi danke himnas al la viv' sincere.

AL EVA

Dum multaj jarcentoj homaro eraris,
Pensante, ke dio el ripo vin faris.
Vi estas tutvorta, vortriĉa lavango…
Mi kredas, ke dio vin kreis el lango.

RANO

Kiel verda baloneto
Saltas rano al lageto:
Kva-kva-kva-kva!
Kva-kva-kva-kva!
Bonas vivo en la akvo!

FESTO EN ZOOPARKO

Tra-ta-tam! Tra-ta-tam!
Marŝas la hipopotam'.
Tru-ru! Tru-ru! – sonas kanto
De longnaza elefanto.
Du simioj – Pu kaj Ĉa –
Salte dancas *ĉa-ĉa-ĉa*.
Kia bruo! Kia bruo!
Suprenlevas bekon gruo.
Ĉu okazis incendio?
Brulas kio? Brulas kio?
Diras muso Miki-Maŭso:
– Ne nervozu vi sen kaŭzo!
Gajas ĉiu parka besto
Pro leona edziĝfesto.

ALEKSANDR LOGVIN (1903-1980)



Aleksandr Porfirjeviĉ Logvin[1] naskiĝis 23.12.1903 en la ukrainia urbo Konotop, sed en lia tre frua aĝo la familio transloĝiĝis al alia ukrainia urbo – Lubni, kiun li ĉiam opiniis sia patrujo. Tie li eklaboris kiel fervojisto (relŝanĝisto, konduktoro...), same kiel lia patro. Tie en 1922-23 Logvin lernis Esperanton.

Tre rapide li fariĝis movada aktivulo. Liaj noticoj pri la movado en Lubni aperadis en "Sennaciulo" jam en 1924, kaj en 1925 li estis delegito de la 2-a Kongreso de SEU. Li partoprenias ankaŭ la SAT-Kongreson en Leningrado en 1926. Jam tiam – en la 20-aj jaroj – li komencis provi traduki al Esperanto poeziaĵojn.

Logvin transloĝiĝis en Moskvon en 1925, tamen liaj gepatroj daŭre loĝis en Lubni, kien li revenadis konstante ĝis sia morto, kaj kie, se necese, trovis azilon.

En 1930 pro anarkiismaj konvinkoj li estis kondamnita al 2 jaroj da punlaboro en Arĥangeljsk. Tie li dividis la loĝadon en prizono kaj laboron de kloakpurigisto kun krimuloj. El tiu ekzilo venis la poemo, kiu famigis lin: "Al mia fratineto Ola".

Post reveno al Moskvo li eklaboris kiel metaltornisto. En tiu periodo (1931-

[1] Antaŭ la dua mondmilito li ĉiam figuris sub la nomo (pseŭdonimo) *Aleksandro Liljer*. Nur en la 1950-aj jaroj sub liaj verkoj aperis la subskribo *Logvin*.

35) liaj poemoj estis plej aktive publikigataj en “Sennacieca Revuo”, “Heroldo de Esperanto” kaj aliaj E-gazetoj. Tamen fine de la 30-aj, kiam la E-movado en Sovetio estis subpremita, lia verka aktiveco poiomete ĉesis, kaj oni ne renkontas liajn poemojn kun datoj inter 1940 kaj 1959.

Dum la dua mondmilito lia profesio ŝanĝiĝis: li fariĝis ĵurnalisto de uzinaj gazetoj – de Aŭtouzino je la nomo de Stalin (nun – Liĥaĉov), poste en la gazeto “Vsjo dlja Rodini” (“Ĉion por la Patrio”) de raketuzino je la nomo de Ĥruniĉev. En 1951 li estis informita, ke aperis denunco pri liaj “kontaktoj kun eksterlando”, kaj li fuĝis al la patrino al Lubni, kie pasigis jaron ĝis aperis ebleco reveni en Moskvon. Tiutempe lia patro kaŝis liajn esperantaĵojn en abelujo. Li denove eklaboris en gazeto de la sama uzino, kaj laboris tie ĝis sia emeritiĝo en 1968. Estante profesia ĵurnalisto, li fieris pri sia membreco en TEĴA.

Ekde 1959 originalaj poemoj de Logvin kaj liaj esperantigoj el la rusa kaj ukraina estas denove vaste publikigataj – plej abunde en “Norda Prismo” kaj “Paco”, sed ankaŭ en “Heroldo de Esperanto”, “Nuntempa Bulgario”, “La Suda Stelo” kaj pluraj aliaj periodaĵoj. Pinto de liaj publikiĝoj estis la libro “Sur la vivovojo” (1964), kiun kompilis Ferenc Szilágyi, kaj eldonis J.Régulo en “Stafeto” (*beletraj kajeroj 24*).

Estas notinde, ke Logvin, multe kontribuinta al diversaj gazetoj en la 1960-70-aj, estas tre magre prezentita en sovetiaj eldonaĵoj. Eble, la sola escepto estas la poemaro de Lesja Ukrainka (1969), kie estas naŭ liaj tradukoj.

Logvin en lasta periodo de sia vivo ne estis tre kontaktema persono, des pli ke jam en la 1960-aj li ofte malsanis. Moskvaj esperantistoj en la 1960-70-aj jaroj preskaŭ neniam renkontis lin en la klubkunvenoj kaj diversaj E-aranĝoj. Pleja parto de liaj kontaktoj kun esperantistoj estis koresponda. Ŝajnas, li ne ŝatis vojaĝi ien krom la kara Lubni. Mortis la poeto la 21-an de julio 1980.

Aleksandr Logvin estas vere koninda E-poeto, kvankam lia talento eble ne estis tiom brila, kiel tiu de Hohlov kaj Miĥalski. Estas bedaŭrinde, ke liaj verkoj fariĝis iom forgesitaj. Pluraj liaj pecoj estas karakterizataj de fascina lirikismo, kvankam la poeto-laboristo ĉiam konservis intereson al gravaj sociaj problemoj.

Nikolao Gudskov (Moskvo)

GRUOJ

Al Aleksej Nedogonov[1]

Bele bluas la ĉiela vojo.
Ĉu ne frue
gruoj flugas for?
Gruoj, gruoj,
kial kun malĝojo,
triste kial bruas via ĥor’?

Flugas birdoj,

[1] Aleksej Ivanoviĉ Nedogonov – rusa poeto, laŭreato de Stalin-premio, mortis 33-jara akcidente en Moskvo en 1948. A.Nedogonov estis amiko de la aŭtoro.

dio-scias kien
al nekonateco
de l' senfin'...
Sole unu falis,
restis... Plie
la gruid' ne povis
levi sin...

Kaj subite trajn'
lukselumita
fendis nokton
en du partojn for!
Ekkrietis
eta bird' vundita,
sed neniu helpis.
Tremis kor'.

Oni devas vivi ĝis mateno,
kredis ĝi:
revenos la birdar',
Ve,
malvarma estis ĉirkaŭpreno
de la nokt'
profunda, kiel mar'...

Nigras nokto
time-silentema,
nur en malproksimo –
la fajrer'
estingiĝas,
flagras
pela,
trema,
la lumeto
sola sur la ter'.

Kies flam'?
Ĉu ne animo tie
malaperis en mallumo jam?
La gruido
nur ektremis krie,
sed neniu helpis...
Mortis flam'!

Flugis gruoj,
flugis al la suna,

subĉiela
longe-longa voj'.
Sola restis
birdamiko juna
sur la ter' –
azilo de malĝoj'...

Moskvo, 1935

BALADO PRI ROALD AMUNDSEN

En nord' kirloventa
al homoj de l' mond'
alvenis alarmo fatala:
rompiĝis, pereis
balono de Nobile –
febla, fragila "Italia".

La ŝipoj Eŭropaj
kaj aviadiloj
sin ĵetis por savi
viktimojn.
Norvegoj kaj svedoj
kaj rusoj al "SOS"
revokis kaj savis
l' "animojn"...

Nebule kaŝitaj
en neĝo, en mar',
fariĝis por ĉiam
detaloj
de la ekspedinto
sur la glaciar'
legenda kaj trista
"Italia"

Sed restis – ho, ve!
netrovita grupet',
kaptita de ŝtormo en foro...
Sciinte pri tio,
la hom' de l' impet'
revokis per nobla
koro.

Kaj Amundsen flugis
sur franca "Latum"
Por savi kolegojn
ĉi-foje.

Sed baldaŭ la mondon
konsternis la fam':
"Latum" malaperis
survoje.

– Kio estas al vi?
– "Latum", "Latum"! –
Demandas la Ter'
emocia...
Sed en oceano
radio-gam'
ekĉesis pro spasmo
glacia.

Pereis plej brava
heroo de l' arkto,
natur-esploristo genia.
Norvegoj plorpetis:
– "Ho, serĉu Rualon!
Ho, savu Rualon
nian!"

Sed mutis nebulo.
Nenia respond'.
La arkta dezerto silentis.
La mevoj forflugis
al la horizont'.
Kaj ŝajnis – ne kriis –
lamentis...

Venkinto de l' vasto,
de l' Suda Polus',
la homo de vol',
de kuraĝo,
Vin logis arkano
de nekonatec',
vin vokis eventa
vojaĝo.

Teruraj obstakloj,
kaj baroj sen fin'
tempest-karuselo
senĉesa,
sed por vi Poluso
ja kvazaŭ destin' –
tiranta, amata, impresa.

Vi flugis el kara,
el blua fiord'
kaj plu ne revenis al domo...
Nun restis por ĉiam
nur la rememor',
monumento kaj monda
rekono.

Se kredi legendon –
la blanka mev' –
anim' de marist pereinta...
Ho, kiom da mevoj
en la ocean'!!!
Gloron al ĝi
aperinta!

27.03.1977

MIKAELO GIŜPLING



Ĉi-jare estis la 60-a datreveno de la esperantistiĝo de Mikaelo Giŝpling. Malmultaj gesamideanoj povas fieri pri tia E-staĝo. REGo gratulas nian ŝatatan Poeton kaj deziras al li ankoraŭ multajn sanajn kaj fruktodonajn jarojn por lia vivo kaj E-staĝo. Ni publikigas pecon de la antaŭparolo al lia unua libro "El sisma zono" kaj du versaĵojn el tiu libro.

Mi preskaŭ timas registri mian admiregon pri tiu ĉi poemaro. Mi timas, ke la homoj pensos, "Jen tiu facilanime laŭdema Auld denove troigas sian entuziasmon". Se estus tiel, mi similus tiun misfaman paŝtisteton, kiu tro ofte kiriis "Lupon!" – jam venis reala "lupo": ĉu la homo ignoros mian alarmon? Espereble ne, ĉar jam delonge mi ne renkontis tian aŭtentikan lirikiston, tian versmajstron, kies fortaj rimoj kaj vortmuziko enkadrigas temojn vere trafajn kaj studindajn.

…

Dante li eble ne estas. Eble ia Heine sombra, aŭ ia Bodlero? Aŭ eble simple nia potenca, elstara poeto Giŝpling?

William Auld

ESPERANTO

En la brua orkestro mi aŭskultas la aldon,
Kiun dampas la batoj de feroca tambur'…
Kuraĝago de herbo, kiu boras asfalton
Kaj leviĝas tra fendoj al la suna lazur'.

La tamburo bruegas sub aklamaj instigoj,
Sed la kanton de l' aldo ne ĉesigas la damp'…
Kuraĝago de herbo, kies floroj kaj tigoj
Per botetoj kaj hufoj dispremiĝas sur kamp'.

Vivkapablas la ido de la kordoj kaj arĉo,
Se ĝi flirtas en bruo, kiel gaja hirund'…
Kuraĝago de herbo, kiu falas dum falĉo,
Sed sukcesas restigi sian ĝermon en grund'.

La muziko triumfas, kaj penetras la planto
Tra beton', kaj perforton superfortas l' esper',
Kaj finfine alvenos al la venk' Esperanto
Kun la herbo floranta, kun la kant' kaj la ver'.

Mis… La prefikso diras pri eraroj.
Obsedas nin misagoj kaj misfaroj.
Dum mia viv' mi ofte miskondutis,
Mispaŝis, misakuzis, missalutis,
Misskribis, miskorektis, misproklamis,
Miskisis, mispromesis kaj misamis.
La vivon mi misuzis kaj eltrivis –
Do mi neniam vivis, sed misvivis.
Amikoj, tamen antaŭ nia diso,
Por ke ne estu ĝi definitiva,
Mi revas pri ankoraŭ unu "miso":
Se mi mismortos, do mi restos viva!

LA POSTDOMO

Ĉiu, kiu iom regule legas E-gazetaron kaj ret-dissendojn, scias pri apero de "E-Civito", demisioj en Centra Oficejo, krizo en la rilatoj UEA-TEJO, malkresko de la membraro, kadukiĝo de Roterdama oficejo, la financaj problemoj... Kontraŭ negativaĵoj ekzistas potenca armilo – rido. Do jen somere 2003 dum Gotenburga UK furoris la libreto de István Ertl "La Postdomo" (Eldonejo Bero, Rotterdam). Prezo – 9 eŭroj, sed preskaŭ duonon de la teksto oni dum kelkaj monatoj povis senpage legi rete (nun, ŝajne, ne plu). Estas indikite, ke *"el ĉi tiu dua eldono... estas forstrekitaj ĉiuj partoj de la unua eldono kiujn la procesoj ĉe la Boterhama Alta Kortumo kaj ĉe la Tribunusa Tribunalo de Sabloreto juĝis ofendaj kaj kalumniaj"*. Nature, oni ne trompiĝu, neniu unua eldono ekzistis – tiu frazo nur pravigas malgrandecon

de la libreto kaj aludas ke la traktataj eventoj eble meritas eĉ pli drastajn vortojn...

Depost la fama "La Majstro kaj Martinelli" ni ne havis tiom brilan primovadan satiron. Vere, "La Postdomo" eĉ superis la iam furoran kamaĉaĵon, ĉar celas pli vasten. La aŭtoro senindulge vipas la konatajn eventojn de lastaj jaroj. Eble oni memoras pri murdo de radikala nederlanda politikisto, post kio lia partio plipopulariĝis. Iom da fantazio kaj troigo, kaj jen ni vidas brilan detektivecan historieton kiu povus okazi en E-movado.

Ĉiu membro de UEA probable sen granda peno identigos gesinjorojn Raneto Krozeti, Miela Liphari, Trefort Stilo aŭ Toy Bigboy. Evidente ĉiu el kelkdek rolantoj (ankaŭ tiuj, kiuj mem ne aperas, sed nur estas menciataj, kiel "ĉefa promulgisto Ĵaluznik") kaj nomhavaj objektoj havas realajn prototipojn. Serĉi ilin estas interesa kaj amuza tasko. Kelkajn ulojn oni eble identigos nur persone konante la prototipojn – mi certas ke ĉiu leganto konas almenaŭ unu el tiuj. Rolas ankaŭ protagonistoj el pli frue konataj E-satiraĵoj – Paula Mährti, E.Ország.



Viglega, sukplena lorjakeca stilo memorigas ankaŭ pri la Praga kaj – jam forgesita – "Sezona" skoloj. Jes, la leganto bezonas havi bonan vortprovizon aŭ rigardi vortaron – sed ja la libreto celas spertajn aktivulojn: kiu orientiĝas en subtilaĵoj de la movado, tiu kutime ne havas problemojn pri lingvoscio. Do ĝuu: "*Ne koprolaliu. Mi statas malrelegaciita eksprizonen. Ili aperceptis mian inocenton.*" (Ne timu, tiel parolas nur unu persono, la ceteraj esprimas sin pli normale!) Ĉie estas disŝutitaj vortludoj – multas fikciaj nomoj, kiujn oni povas eĉ ne rimarki dum rapida lego: Novregio, Brutujo... Verŝajne por kapti kelkajn aludojn kaj vortludojn oni devas sci(et)i ankaŭ la nederlandan lingvon, sed pri multo eblas facile konjekti (televida "Kanaal Banaal", kiu iĝas "Kanaal Anaal" kaj "Kanaal Bacchanaal"). Iam oni ridas pro neatendita vortumo: "*Humpty Dunkin kaj Peklo Kofri sidis antaŭ plastoglasoj da kafo en policejo. Ambaŭ aspektis certagrade naŭzaj, kaj ambaŭ estas konataj el pli frua ĉapitro – tio estas, la plastokafo kaj la policejo en Veerkrachtsplein.*" Aŭ jen:

"*– Aĥ, mi miksis, ĉi tio venis por Belartaj Konkursoj (...) de iu Tinĉjo Bold, nova talento. Eble li ricevos Pokalon Averaĝu, se ne Giorgio Kacmacho.*

– Sed tiuj estas nek novaj, nek talentoj!

– Nu, kaj? Estas nek belartaj nek konkursoj!"

Neengaĝita preskoboldo apenaŭ sukcesus akurate fari el manpremoj – "mampremojn" kaj el retmesaĝo – "ratmasaĝon"...

Certe ne ĉiuj tuŝataj temoj estas egale gravaj. Por kompreni iujn el la multaj aludoj oni devus konstante legi la revuojn "Esperanto", "La Ondo de Esperanto", "Monato", LF k.a., sed eble eĉ tio ne sufiĉos. Povas esti, kelkaj spritaĵoj plene kompreneblas nur al tiu, kiu mem laboris ĉe UEA-oficejo. Ne gravas. Estu stimulo por pli vasta publiko studi la novan historion de E-movado.

Fine de la libro la kadukaj muroj de la oficejo *ekkrakis kaj falis por ĉiam*. Ni esperu, ke la reala UEA sukcesos eviti la sorton de sia libra ĝemelo. Eble ĝuste dank' al tiu satira averto. Kaj sekva generacio de esperantistoj legos "La Postdomon" de I.Ertl (reeldonotan kun ampleksa komentaro) same kiel nun ni legas "La Verdan Biblion" de I.Lejzerowicz – ne nur por amuziĝi, sed ankaŭ por lerni movadhistorion de certa periodo, ekscii pri homoj *kiujn alikaze glutus letea forgeso*...

Valentin Melnikov (Moskvo)

APERIS NOVA KANTARO POR ESPERANTISTOJ!

"Ha, sed ĉu tio estas novaĵo? Jam ekzistas multegaj ili papere, rete. Ĉu indas krei novan?" – eble vi demandos. Vere, vi pravas, sed duone.

Mi prezentas al vi kantaron tute alian, ol vi alkutimiĝis scii. Ĝi estas reta kantaro – vikio. Tiuj el vi, kiuj konas kio estas vikio, eble jam ĉion komprenis. Se ne, permesu al mi konatigi vin kun tiu nova teknologio de komuna laboro.

1. Komencu ni de ordinaraj retaj paĝaroj. Do, vi vidas paĝaron kun iuj informoj. Vi povas legi, printi, preni dosierojn, bildojn. Vi estas nur spektanto. Vi ne povas ion ŝanĝi. Sola rimedo influi la enhavon iel, estas leteri al la paĝar-aŭtoro. Iam por interŝanĝo de ideoj samtempe kun iu paĝaro oni kreas dissendoliston. Ĉiufoje vi povas nur skribi viajn opiniojn, kaj se oni ilin akceptas, la paĝaro iel ŝanĝiĝos. Atentu, ke temas pri ajnaj ŝanĝoj: ĉu korekto de simpla mistajpo aŭ malĝusta informo, ĉu nova propono, aŭ eĉ ideo preni novan ttt-koncepton. Kvanto de tiaj paĝoj en Interreto nun estas plej granda.

2. En aliaj, parto de la informoj, plejparte iu datumoj, redakteblas de vizitantoj. Plej vaste konataj estas babilejoj, aŭ retaj afiŝejoj (deziras korespondi, vendi/aĉeti, ktp.), mi ne skribu konkretajn adresojn. Tie nur parto estas ŝanĝebla, dum la cetero, ostaro de la paĝaro konstantas. Vi povas aldoni ekz. vian anoncon, ĝin poste korekti aŭ neniigi. Eblas diri, ke ĉiuj paĝaroj, havantaj almenaŭ gastlibron, estas de tiu dua klaso.

3. Vikioj. Vi ne kredos, sed en vikio vi ĉion povas ŝanĝi! Korekti erarojn, skribi novajn paĝojn, meti ligojn, bildojn, dosierojn por dispono de ĉiu vizitanto. Vi povas eĉ refari aspekton de ĉefa paĝo! Sola afero, kiun vi ne rajtas, estas ŝanĝi bazan programaron de la vikio, kiu ebligas ĉion ĉi. Certe vi nun pensas, ke tiu libero ne povas daŭri eterne, alie venos kaoso, tohuvabohuo (mi unue uzas tiun vorton ne kante)! Jes, trankviliĝu, vi ja estas ne sola, krom vi estas aliaj retumantoj, kiuj samtempe rajtas fari ĉion inverse. Dum vera komuna laboro ĉiam okazas ekvilibro, kunlaborantoj kreas komunaĵon. Ankaŭ en vikio.

La plej granda e-ista vikio nun estas vikipedio – la libera enciklopedio <www.eo.wikipedia.org>. Ĝia kreanto estas Chuck Smith. En la servilo <www.tejo.org> vi povas konatiĝi kun provaj TEJO- <http://www.tejo.org/vikio/> kaj UEA-vikioj <http://www.tejo.org/uea>.

Kaj nun – kantaro-vikio. Ĝin lokas la fama grupo E@I, la adreso estas <www.ikso.net/kantaro>. La kantaro enhavis en novembro pli ol 100 kantotekstojn, krom ili – artikolojn pri la aŭtoroj, muzikaj grupoj, k-diskoj. Ni (unuaj uzantoj) povas fanfaroni, ke ĝi havas inter aliaj la tekstojn de "Sola" (Amplifiki), "IS", tradukon de "Hotel' Kalifornia", multaj kantoj el la konataj por rusaj e-istoj "Oraj kantoj". Komencanta muzikisto trovos kun la tekstoj ankaŭ akordojn kaj eĉ iliajn priskribojn (se iuj mankas, do aŭtoru vi mem)!

Instrumentaro de la vikio permesas rapide trovi ĉiun kanton, tekston, kantojn de iu aŭtoro aŭ grupo. Por komforto de uzantoj estas kreitaj indeksoj de infanaj kantoj, tradukitaj kaj la plej konataj.

Mi esperas interesigi vin pri tiu kantaro kaj ĝenerale pri vikio-teknologio. Ĝi ne evoluos sen via aktiveco, tiu aktiveco estas vikio-motoro. Ideale, mi vidus la kantaro-vikion kiel lokon, kie ĉiu muzikema homo povas preni ĉion bezonatan por sia melodia animo. Skribu kantojn, notu viajn klarigojn pri iliaj devenoj, rakontu pri via ŝatata kantisto, grupo. Aktivu kaj muzikaj spertuloj kaj ĵuskomencintoj. Ni ĉiuj agu por reciproka utilo.

Aleksej Kuznecov (Kostroma)

RUSIANO GAJNIS EN LA ESPERANTA FABELKONKURSO

La literatura kaj kultura centro Päätalo-instituto kaj Vilaĝa Asocio de Metsäkylä en Taivalkoski, Finnlando, organizis ĉi-jare por la kvara fojo fabelkonkurson en Esperanto por infanoj 6-13-jaraj. Ĝiaj rezultoj estis anoncitaj la 18-an de oktobro samtempe kun tiuj de la fabelkonkurso por finnaj lernejanoj, kiun Päätalo-instituto organizas ĉiujare ekde 1993. La rezultojn anoncis s-ino Aini Vääräniemi, prezidantino de la Vilaĝa Asocio. Etaj Esperanto-lernantoj de Metsäkylä kantis en la festa aranĝo kaj kantigis ankaŭ la publikon en Esperanto.

La Esperanto-konkurso allogis 14 fabelojn el ok landoj, t.e. same multe kiel en 2002. Ili estis prijuĝitaj de ĵurio, en kiu membris s-inoj Sylvia Hämäläinen, Anja Karkiainen kaj Raita Pyhälä (Saliko). La ĉefan premion, "Fabelo Internacia", gajnis Jaroslav Vorobjov el Iĵevsk (Rusio), laŭreato de la 1-a premio en la aĝgrupo de 12-13-jaruloj, pro sia fabelo "Ljapiklando kaj ties loĝantoj ljapikoj".

La fabelo de Jaroslav Vorobjov aperos almenaŭ en la revuoj "Juna amiko" kaj "La Ondo de Esperanto". Informo pri la rezultoj de la konkurso aperis en pluraj finnaj tagĵurnaloj.

Rezultoj:

<u>Kategorio A (6-9-jaraj)</u>

1. Alina Calibe Bruegger (Germanio) pro "La floreto";
2. Larissa Bister (Finnlando) pro "La aventuro de For-Miko";
3. Francesco Bentigvoli (Italio) pro "Pupo por amiko" kaj Klara Delarasse (Fran-

cio) pro “Kuniklo kun knabino”.

Kategorio B (10-11-jaraj):

1. Hajnal MacGill (Hungario) pro “Surikato en Usono”.

Kategorio C (12-13-jaraj):

1. Jaroslav Vorobjov (Rusio) pro “Ljapiklando kaj ties loĝantoj ljapikoj”;
2. Paolo Pezzi (Italio) pro “La lando de la pano” kaj Silvio Ravaioli (Italio) pro “Filipo”;
3. Laura Ziegelmueller (Svislando) pro “Ĵinja”.

Grupoj:

1. Grupo el Ecole de la Grande Ourse (Svislando) pro “Amo sen limo”;
2. Grupo “Amiketoj de Kolibridoj” (Kubo) pro “Feĉjo la kapreolo”;
3. Ivan Gandolfo kaj Martin Haldemann (Svislando) pro “Marcel”.

(landa-agado)

FABELKONKURSO ANKAŬ EN 2004

La estraro de la literatura-kultura centro Päätalo-instituto (Taivalkoski, Finnlando) decidis organizi Esperanto-fabelkonkurson ankaŭ en 2004. La konkurso, pri kiu la Instituto kunlaboras kun la Vilaĝa Asocio de Metsäkylä, okazas ekde 2000. Kvankam la Instituto ne tre kontentas pri la nombro de konkursaĵoj (po 14 en 2002 kaj 2003), ĝi fidas, ke venontjare la Esperanto-movado diskonigos la konkurson pli aktive. Anonco pri la sekva konkurso kaj elektitaj premiitaj verkoj el la jaroj 2000-2003 legeblas en la retejo de la Instituto: <http://www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/esperanto.htm>.

Osmo Buller (Finnlando)

LA LIBRO “VIVO DE ZAMENHOF” OFICIALE ELDONIĜIS

Por la 89-a UK en Pekino en 2004 LEA (Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, Ĉinio) finis kompiladon de “Vivo de Zamenhof” kun 299 paĝoj. Lastatempe ĝi oficiale estis eldonita de la eldonejo de Liaoning-Universitato.

“Vivo de Zamenhof” estas redaktita de s-ro Liu Zhengkun, prezidanto de LEA, kaj s-ro Song Yunsheng, direktoro de la konsilio de LEA. Ĝi estas la unua biografio pri Zamenhof rekte kompilita de ĉinoj en la ĉina lingvo. Tiu ĉi bindita libro celas prezenti la farojn, studan rezulton kaj ideologion de filozofio pri la tuta vivo de Zamenhof. Ĝi enhavas 162 bildojn aŭ fotojn pri Zamenhof. Ĉina Esperanto-Ligo donis siajn entuziasman gvidon kaj fortan helpon al la kompilado.

Wu Guojiang, vicprezidanto de LEA

ESPERANTAJ GAZETOJ ABONEBLAJ EN 2004

“La Ondo de Esperanto”, internacia sendependa magazino, ĉiumonata; 20 paĝoj, 250 rubloj.

“Esperanto”, organo de UEA, ĉiumonata; 24 paĝoj, 16 eŭroj.

“Kontakto”, socikultura revuo de TEJO, dumonata; 16 paĝoj, 10 eŭroj.
“Heroldo de Esperanto”, trisemajna informa gazeto; 4 grandaj paĝoj, 32 eŭroj.
“Literatura Foiro”, kultura revuo dumonata; 56 paĝoj, 30 eŭroj.
“Juna Amiko”, revuo por lernejanoj kaj komencantoj, trimonata; 32 paĝoj, 7 eŭroj.
“Monato”, internacia magazino sendependa, ĉiumonata; 32 paĝoj, 20 eŭroj.
“La Jaro”, praktika poŝkalendareto de “Monato”; 160 paĝoj, 5 eŭroj.
“La Gazeto”, eldonas E-klubo de Metz, dumonata; 32 paĝoj, 7.50 dolaroj.
“Litova Stelo”, organo de Litova E-Asocio, dumonata; 32 paĝoj, 7 eŭroj.

Ni povas peri abonon por aliaj E-gazetoj, sed la listigitaj gazetoj proponas favoran tarifon por Ruslando. Konvertu la abonprezon al rubloj laŭ la oficiala kurzo, kaj aldonu 2% por kovri la diferencon inter la oficiala kaj banka vendokurzoj.

La kotizojn akceptas Галина Романовна Горецкая, а/я 1248, 236039 Калининград.

Abonu kaj legu Esperanto-gazetojn!

INTERESE KAJ AMUZE PRI KATOJ

Ĉiu katposedanto sciu, ke katon posedi ne eblas.
Hundoj opinias sin homoj, katoj opinias sin dioj.
Hundoj vidas dion en la mastro, katoj – en spegulo.
Hundoj estas infanoj, katoj – kamaradoj.
Antaŭ jarmiloj katoj estis adorataj kaj diigataj. Ili ne forgesis tion.
Kato, iru for! Mi eĉ sen vi tro multe ridetas.
Ekzistas kvar specoj de la katnutraĵo: la seka, la konservita, la natura kaj la via.
Katoj estas multe pli saĝaj kaj sendependaj ol hundoj. Vi apenaŭ sukcesos jungi al sledo okon da katoj kaj devigi ilin tiri ŝarĝon.
Ĉu tio estis grava dokumento? Mia kato opiniis, ke tio estas matenmanĝaĵo!
Li kuras kiel muso dum katfoiro.
Musoj havas rajtojn, sed katoj – krifojn kaj akrajn dentojn.
Katojn ĉiam allogas tiu homo, kiu malpleje atentas ilin. Ĝuste tial ili povas salti sur la manojn unuavice de tiu homo el la homgrupo. (Interalie, ĉu ne ŝajnas al vi, ke ĉi-rilate katoj tre similas al virinoj?)
Li estas okupita, kiel unuokula kato, observanta du mustruojn.
Katoj ofte suferas diversajn malsanojn, sed mi eĉ ne unu fojon renkontis katon, kiun turmentus sendormeco.
La tempo, pasigita kun la kato, neniam estas perdita.
La kato estas kreito, kiu tutvive pruvas al ni, ke nur manĝi kaj dormi estas ne tiel malbone.
Katoj estas modeloj de la honesteco. Ili neniam kaŝas sian negativan alrilaton.
Edukado de infanoj tre similas al provo kunigi katojn en unu gregon.
Li honestas, kiel kato, kiu ne povas atingi ĝis telereto kun viando (angla proverbo).
Kuseno sur lito apartenas unuavice al la kato.
Ju pli multajn homojn mi renkontas, des pli forte mi ŝatas katojn.
Katoj restigas siajn piedspurojn sur niaj koroj.

La kato estas la lasta rimedo kontraŭ laciĝo aŭ streso.
Evitu la homojn, kiuj ne ŝatas katojn (irlanda proverbo).
La felisedoj ne ŝatas citrusan odoron.
Katoj kaj hundoj ĉion vidas blua.
Katoj ne perceptas la dolĉan guston.
Katoj kapablas eligi cent sonojn, dum hundoj – nur dek.
Nigraj katoj plejparte estas multe pli trankvilaj ol la blankaj.
La scienco pruvis, ke kato, falanta de sur la sepa etaĝo, havas je tridek procentoj malpli da ŝancoj resti viva ol tiu falanta de sur la dudeka. La klarigo estas, ke la kato bezonas ioman tempon por kompreni, kio okazas kaj kio farendas; por tio ĝi bezonas proksimume ok etaĝojn da flugado.
Plejmulto da helblu-okulaj katoj malbone aŭdas.
Lipharoj de la kato, kiuj servas al ĝi kiel radaroj, kapablas senti moviĝon de objekto ducentoble pli malgranda ol larĝo de homa haro.
Nur unu el mil rufaj katoj estas femalo.
Malsovaĝaj katoj, diference de aliaj animaloj, dum la lastaj kvar mil jaroj praktike ne aliiĝis.

el la rusa tradukis Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj, Moskva reg.)

KVARDIMENSIA MONDO EN TRI LINGVOJ

Ne ofte aperas sciencaj verkoj en Esperanto. Sed peterburga sciencisto, filozofo kaj sociologo Leo Semaŝko eldonis sciencan verkon ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la rusa kaj la angla en unu 390-paĝa volumo. Li tion faris je propraj rimedoj.



Lia verko nomiĝas “Tetrasociologio”, ĉar li konsideras kvardimensian strukturon de homa sociologio. “Tetra” estas grekdevena prefikso kaj signifas “kvar”. La kvardimensia modelo estis aprobita fare de sociologoj el aliaj landoj, kaj en la libro, krom la verko de Semaŝko mem, estas publikigitaj artikoloj de sciencistoj el Rusio, Usono, Japanio, Aŭstralio, Germanio kaj Britio.

La aŭtoro komprenas, kian pozitivan rolon povas ludi Esperanto en interkultura dialogo, kaj en la volumo estas publikigitaj specialaj artikoloj pri E-o. La aŭtoro nur komencis studi E-on, kaj traduki ĉiujn artikolojn li petis esperantistojn el Peterburgo kaj el aliaj urboj. Tiu tasko estis urĝe plenumita, kaj la libro estis jam prezentita dum UK en Svedio, la Libroservo de UEA aĉetis kelkajn ekzemplerojn. En 2004 en Pekino okazos Internacia Kongreso de

sociologoj, kaj la aŭtoro havas intencon efektivigi novan eldonon de la libro denove en tri lingvoj: la ĉina, la angla kaj E-o.

La libro estas interesa al specialistoj kaj al ĉiuj, kiuj interisiĝas pri multkultura dialogo inter civilizoj. Krome, ĝi povas servi kiel bona helpilo por tradukista praktiko. Pli detalan informon eblas ricevi rete ĉe <semashko@mail.admiral.ru> aŭ ruslingve laŭ telefono en Peterburgo 5133863.

M.Abolskaja (Sankt-Peterburg)

LITERATURA KONKURSO DE LIBE

Ĉi-jare okazis literatura konkurso, organizita de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE). Entute venis 28 verkoj de 12 aŭtoroj el 6 landoj. Necesas substreki, ke la kvalito de la plimulto de prezentitaj tekstoj estis sufiĉe alta, kvankam unu el la aŭtoroj sendis verkon, kie gramatikaj eraroj estis, verdire, pli multaj, ol la vortoj, kaj tiun tekston ĝenerale ne eblas pritrakti kiel seriozan literaturaĵon.

Bedaŭrinde, ne prezentiĝis kelkaj blindaj aŭtoroj, kies verkoj estas jam konataj kaj laŭdataj en nia medio.

La vidantaj ĵurianoj (Sten Johanson, Geza Kurucz kaj Valentin Melnikov) rilatis al la verkoj de niaj aŭtoroj tre serioze kaj, se necesis, juĝis ilin sufiĉe severe. Foje mi povis legi jenajn opiniojn: “Senvalora banalaĵo” aŭ “Belaj vortoj sen senco”, kaj verdikton: “Rubujen!”. Sed ĉu ni preferus larmoplenan kompaton kaj falsan miron, ke povra blindulo scipovas skribi? Ni venis al konkludo, ke estus bone labori konstante kun niaj aŭtoroj, analizi iliajn verkojn kaj doni utilajn konsilojn.

Ĉiuj partoprenintoj de la konkurso ricevis modestajn donacojn – kasedojn kun E-muziko. La plej bonaj verkoj estos publikigitaj en “Esperanta Ligilo” (mi jam sendis ilin al la redaktoro) kaj en la aliaj E-periodaĵoj.

Mi nomos la aŭtorojn, kies verkoj estis rekomenditaj por aperigo.

Poezio – partoprenis 13 verkoj de 6 aŭtoroj el 5 landoj. Aparte menciindas: Gennadij Gluĥov el la urbo Jelec, i.a. la plej fruktodona partopreninto de la konkurso, – pro “Dorsflanke” kaj aliaj versaĵoj; Eike Forstreuter (Germanio) – pro “Ambicia kulo”; Irena Lowinska (Pollando) – pro “Balado pri perfidita edzo” kaj A.I.Ĵukova (Kislovodsk) – pro “Ne relegu malnovajn leterojn”.

Prozo: partoprenis 15 verkoj de 7 aŭtoroj el 5 landoj. Publikigindas: Maria Choma (Pollando) – “Neokazintaĵoj” (estus bone, se ĝi aperus kiel aparta libreto); Gennadij Gluĥov – “Alia mondo” kaj “Kiel ĉasi virojn” (jam aperinta en “Viburno”).

Nome de la ĵurio de la konkurso mi kore salutas ĉiujn partoprenintojn kaj deziras al ili multajn sukcesojn en ilia agado.

O.Poŝivana, ĝenerala sekretario de LIBE

Irena Lowinska (Pollando)

BALADO PRI PERFIDITA EDZO

Sur monto ĉe river’,
En oportuna dom’

En ĝojo kaj prosper'
Feliĉa vivis hom'.

Edzinon havis li
Pli belan ol sunbril',
Sed enamiĝis ŝi
Al lia... komputil'.

Nenion sciis li
Pri tiu ĉi afer',
Kaj daŭris idili'
En domo ĉe river'.

Do, povis la edzin'
Senĝene, en trankvil'
Alproksimigi sin
Al lia... komputil'.

Ioma pasis temp',
Semajnoj du aŭ tri.
Subite el la hejm'
Forkuris ien ŝi.

La edzo serĉis ŝin
Belstile, kun ĝentil',
Sed ŝi perfidis lin
Kun lia... komputil'.

Monatoj pasis naŭ
Sen kiu ajn esper',
Skuegis eĉ skandal'
La domon ĉe river'.

Por li ne restis plu
Konsolo, nek konsil',
Ĉar kokris lin edzin'
Kun lia... komputil'!

Sed iam ĉe la dom'
Aperis limuzin',
Kaj malfeliĉa hom'
En ĝi ekvidis ŝin.

Revenis la edzin'
Kun pardonpetoj mil:
"Ne plu mi kokros vin
Kun via... komputil'!"

"Saluton, karulin'!

Bonvenon post reven',
Sed diru, kion vi
Portegas en kusen'?"

"Rigardu, ho karul',
Jen estas nia fil':
Duone hom'-etul',
Duone komputil'!"

Kaŝiĝas vera senc'
En tiu ĉi fabel':
Pri ĝi memoru edz'
Revanta pri fidel',

Kaj zorgu pri l' edzin',
Ĉar iam kun facil'
Ŝi povas kokri vin
Kun via... komputil'!

Gennadij Gluĥov (Jelec)

DORSFLANKE...

"Altigu registar' al ni salajron!" –
Ŝi kriis dum mitingo sub la hajlo.
Vespere jam en la restoracio
Ĉampanon drinkas ŝi – "Je la nacio!"

Nun ruĝan flagon ŝia man' balancas.
Vespere ŝi en luksa robo dancas.
Adultas ŝi kun la sekretario
De komitat' de la laborpartio.
En liaj brakoj ĝemas ŝi feliĉa:
"Ho, kiel estas la popol' malriĉa!"

Ornamas ŝin kolĉeno diamanta –
Donac' de l' edz', tri bankojn posedanta.
Sed ree ŝi alvokas la aĉulojn:
"Popol'! El nia lando – for riĉulojn!"

Kaj aŭdas la kolego-instruisto
En ŝia voĉ' sinceron de la tristo,
Al ŝi kunsentas li pro malriĉeco –
Ja ŝin ne vidis li en "Mersedeso".

Agante tiel por la bon' de l' homo,
Ripozas ŝi en trietaĝa domo.
Ja ĉiuj aŭdis: kriis ŝi sub hajlo,
Ke registar' altigu la salajron.

PRI ĈUKOMPRENO KAJ AŬKOREKTO

"... Kaj la popoleto, paca kaj naiva,
ŝajnis plene preta por eterna vivo."
el la kanto "Tragedio de homo"

En la n-ro 4 (17) de REGo mi legis la artikolon "Kompreni kaj korekti" de Anatolo Gonĉarov. Kelkaj opinioj en ĝi estas vere amuzaj. Anstataŭ komentoj (ankaŭ por iom prezenti la novan produktaĵon) mi proponas al la legantoj peceton el mia nova romano "Dek tagoj de kapitano Postnikov", kie estas tuŝita la sama temo kaj uzita la sama citaĵo de Zamenhof, kiu treege konsternis min en 1978. Mi opinias, ke la enhavo estas komprenebla sen detalaj komentoj, nur la temo ne estas finita – ĝi daŭras poste en la romano. Cetere, la legantoj rajtas elpensi propran daŭrigon.

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

Forlogis min sorĉisto ia
El mia patra land' mizera,
Kaj per potenca mano sia
Al rando mem de globo tera
Transportis min neatendite.
En straton venas mi bruantan
De ia urbo kaj subite...
Parolon aŭdas "Esperantan".
Mi turnas min, kaj jen mi vidas:
Du knaboj iras kaj parolas.
Kun mir' al ili mi rapidas.
– Ho, knaboj karaj! Mi tre volas
Ekscii kiam vi kaj kiel
Paroli lernis "Esperante"?
"Sed ĉiuj ja parolas tiel!" –
Respondis knaboj, ridetante, –
"Alian lingvon ni ne sciis
De tago mem naskiĝa nia"...
Kaj en mirego mi ekkriis:
– Sed kia estas lando via?
"Esperantujo" – ili diris...

(V.N.Devjatnin, "Mirinda lando"
El "Plena Verkaro", Libro tria, Kazan – 1908)

"... Estas vero, ke Esperanto havas nun la plej bonajn kaj brilantajn esperojn por la estonteco: kaj tamen – sufiĉe instruita de la sperto – mi ne estas optimisto! <...> Se eĉ ĉiuj akademioj de la mondo akceptus Esperanton, se eĉ milionoj da personoj ĝin uzadus – nenio garantias, ke en la daŭro de unu jaro ĝi subite ne estos forĵetita kaj forgesita por eterne! <...> Lingvo internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiu akceptus ĝin, kiel sian lingvon fa-

milian, heredan. Cento da tiaj homoj estas por la ideo de lingvo neŭtrala multege pli grava ol milionoj da aliaj homoj. Hereda lingvo de la plej malgranda kaj plej sensignifa popoleto havas vivon multege pli garantiitan kaj neestingeblan, ol senpopola lingvo, kiun uzus eĉ milionoj da homoj."

(Zamenhof al Kofman, 15(28).05.1901)

09.08.1910, la ŝipo "George Washington"

Ĉi-nokte Andreo Fiŝer longe restadis sendorma. La oceano furiozis, kaj ties nigra akvaro plaŭdegis kontraŭ la lumluko de lia kajuto malritme, bestece, horore. Sinjoro Fiŝer turnadis sin en la lito tien-reen, gapis kun maltrankvilo al la lumo palpebrumanta de nokta lampeto, kaj – kun senlima envio – al la najbara lito. Tie, en plena trankvilo kaj paco, ronketis la kajutnajbaro Vladislav Tabenski, kaj la ŝtormego terura restis entute ekster lia sonĝa konscio.

Verdire, sinjoron Fiŝer ne suferigis la marmalsano, sed tiuj senĉesaj kaj – ho, ve! – senritmaj, ĉiufoje eksteratendaj, bategoj de ondoj absolute ne permesis endormiĝi. Li eĉ voletis puŝi la najbaron, kvazaŭ hazarde eligi lin el la dolĉa dormo por ricevi grumblon kaj kompaton. Li longe pensis pri tiu orgojla voleto, tiom longe kaj streĉe, ke la pensado iom trankviligis lin kaj faligis en abismon de malkvieta dormo.

La vigla-brava vekiĝo trovis sinjoron Fiŝer nur je la dekunua – solan en la kajuto, preterlasintan la matenmaĝon, sed efektive satdormintan. Tiu lasta fakto kaŭzis lian bonegan humoron, kiu boniĝis eĉ pli post elrigardo en la lumlukon. La grandioza besto-oceano kvietis ripoze, dormis sen eĉ ero da iama nokta furiozo, kaj la pura, freŝlavita ĉielo bluverdis ĝis la fora horizonto.

Sinjoro Fiŝer fajfetante aranĝis ĉiujn matenajn nepraĵojn – lavadon, razadon, vestadon – kaj gaje ektrotis al la bufedo, kie trovis neniun krom la bufedisto. Ĉiuj pasaĝeroj jam delonge ĝuis la bonegan tagon en la supra ferdeko. Konstatinte tion, sinjoro Fiŝer mendis omleton kun tomatoj, tason da nigra kafo kaj biskviton. La lerta bufedisto rapide plenumis lian mendon, kaj la menditaĵo estis same rapide forkonsumita. La sekvo de tio estis agrabla sata sento de propra graveco kun kiu la membro de Lingva Komitato, Andreo Fiŝer senhaste ascendis la supran ferdekon. Promenpaŝante inter la pasaĝeroj, disdonante afablajn salutojn kaj resalutojn, post kelkaj minutoj li rimarkis kelkpersonan rondeton esperantistan, memsufiĉan en vigla diskuta ardo.

Ĉe ferdeka tableto sidis gesinjoroj Zamenhof, sinjorino Skinner, sinjorino Essigmann kaj sinjoro Postnikov. Envolvitaj en la diskuton, staris malantaŭ iliaj seĝoj ankaŭ la kajutnajbaro Tabenski, longbarba franceto sinjoro Rollet de l' Isle kaj kapitano Perogordo. La diskutgvidanto evidente estis sinjoro Postnikov, montrinta sian malrespekton al sinjoro Fiŝer antaŭ du tagoj. Tiakaŭze la gravplena sinjoro Fiŝer ignorus la diskuton, eĉ se interesan por li, sed oni lin vokis. Eĉ pli precize – lin vokis mem kapitano Postnikov!

– Jen do, gesinjoroj, estas la persono freŝa kaj tre kompetenta! – diris sinjoro Postnikov laŭtvoĉe. – Sinjoro Fiŝer, bonan tagon, kaj – estu bonvena al nia rondo! Ĉu vi deziras diri kelkajn vortojn pri la problemo treege interesa? Via opinio estas estiminda por la ĉeestantoj!

– Dankon, sinjoro kapitano! Bonan tagon, sinjorino Zamenhof! Bonan tagon,

sinjorino Skinner! Bonan tagon, sinjorino Essigmann! Bonan tagon, sinjoroj! – respondis fiere kaj grave sinjoro Fiŝer, aliĝante al la rondeto. – Mi rimarkis, ke via diskutado estas interesa, kaj mi faros uzon el via afabla invito. Tamen, kio estas la temo?

– Perfekte! – elparolis la kapitano gaje. – Do, volu diri al ni, kara sinjoro Fiŝer, ĉu vi havas infanojn?

– Kiajn infanojn? – elbalbutis sinjoro Fiŝer, ĵetante la rigardon, plenan de embaraso, al la ĉarma vidvino, sinjorino Skinner, pri kiu li estis enanime maturiganta certajn planojn.

– Normalajn homajn infanojn, – respondis sinjoro Postnikov dum rido de la ĉeestantoj. – Viajn infanojn – filojn, filinetojn.

– J-jes... – sinjoro Fiŝer elmienigis rideton, ĉar trovis ke ĝi estas nepre kaj tuj bezonata. – Du filojn mi havas, sed mi ne komprenas, pardonu...

– Tuj, tuj! – respondis la kapitano. – Jen estas la demando: ĉu viaj filoj parolas nian lingvon?

– La parencoj... – diris sinjoro Fiŝer, anstataŭigante la rideton per funebro. – La bopatrino, ĉefe... Laŭkutimaĵoj... Do, ili postulas, ke la infanoj okupu sin pri pli seriozaj aferoj...

– Jen do, – diris Postnikov. – Ĉu ni plu parolu pri la hereda Esperanto, se eĉ la persono sincere aldonita ne havas argumentojn por konvinki la parencojn?!

– Aĥ, sinjoro Fiŝer! – diris sinjorino Zamenhof. – Mi ĵus havis la deziron svati viajn filojn al la ĉarmaj kaj ardaj hispaninoj – la filinoj de sinjoro Perogordo. Kio do povas esti pli serioza?!

– Tamen, sinjoro Fiŝer, kiom aĝaj estas viaj knaboj? – Zamenhof demandis.

– Naŭ kaj ses... – respondis sinjoro Fiŝer.

– Do, ne estas tialo por ĉagreno! – proklamis Zamenhof. – Vi ankoraŭ havas la tempon kaj pretekston por rekonvinki la parencojn; imagu – se ili nur ekscios pri la filinoj de sinjoro Perogordo!

– Sinjoro Fiŝer, vi eĉ povas elekti, – evoluigis la temon mem sinjoro Perogordo, – ĉar mi havas tri filinojn! Sep, ses kaj du jarojn aĝajn, kaj ĉiujn mi instruis paroli Esperanton. Do, iliaj fianĉoj nepre devas esti esperantistoj!

– Dankon, sinjoro Zamenhof, dankon, kapitano!... – respondis sinjoro Fiŝer, montrante miksaĵon de ĝojo kaj embaraso. – Estas... estas tre subita via propono... kaj tamen, mi divenas, ke ne la edzigo de miaj filoj estis la parolata temo...

– Vi havas tre profundan envidpovon, kara sinjoro Fiŝer! – ĵetis al li luman rideton sinjorino Skinner, kaj li ne trovis mokon en ŝiaj vortoj.

– Do, sinjoro Fiŝer, vi pravas, – diris sinjoro Postnikov. – La temo estas multe pli grava kaj pli vasta ol la edziĝo de viaj filoj. Sed de tio ni nepre devas komenci, ĉu ne, Ludovik Markoviĉ?

– Nu, certagrade, jes, – konsentis Zamenhof. – Sinjoro Fiŝer, volu ne rigardi tiel timesplore nian kompanion – estas nenia mistifiko, nek moko. Iam kaj ie mi skribis, ke cent homoj, kiuj parolos nian lingvon ekde la naskiĝo, estos pli gravaj por la lingvo ol milionoj da homoj, ekparolintaj ĝin jam en matura aĝo...

– Ni preskaŭ decidis komenci la zorgojn pri tiu cento ekde tuj! – diris sinjorino Skinner. – Se vi edzigos viajn filojn...

– Ekparolontajn Esperanton! – intervenis Perogordo.

– Jes ja – se vi edzigos ilin al la filinoj de sinjoro Perogordo, – daŭrigis sinjorino Skinner, – kaj se ĉiuj ni, travivantaj tiun bonan navigadon, ripetos vian ekzemplon kaj geedzigos niajn infanojn...

– Kaj se ĉiuj Vaŝingtonaj kongresanoj faros tion! – aldonis sinjorino Essigmann.

– Jes, – do ni havos la ŝancon vidi post iom da tempo tiun centon da denaskaj esperantistoj! – finis la penson sinjorino Skinner. – Ĉu vi aprobas tiun ĉi ideon?

– Do... – sinjoro Fiŝer hezite kaj haste serĉis iun spritaĵon en la fundo de sia cerbo, sed konvena spritaĵo mankis. – Do, jes, la ideo estas tre utila, gesinjoroj!

– Vidu, ni havas unu "sed" de sinjoro Postnikov, – diris Zamenhof. – Aleksandr Aleksejeviĉ, volu prezenti mem al sinjoro Fiŝer.

– Senprobleme, – respondis la petato. – Tiu cento, kiun ni esperas produkti, de la naskiĝo parolos Esperanton. Ja ni devas iom zorgi, ke ili ne perdiĝu en la vasta mondo, sed iel pariĝu por produkti almenaŭ du centojn da esperantistoj jam de la dua denaska generacio. Estas nur komenco de la ĉeno... sinjoro Fiŝer, ĉu vi kaptas mian opinion?

– Kiam mi estas sata, mi kapablas kapti ion ajn! – trovis fine la ŝercon sinjoro Fiŝer.

– Do?... – demandis sinjoro Postnikov.

– Do... – respondis sinjoro Fiŝer. – Poste ni havos kvincent denaskajn esperantistojn.

– Kaj nun volu diri, – ridetis sinjoro Postnikov, – estimata sinjoro Fiŝer, ĉu vi estas kaptinta la plej grandan ruzaĵon de nia kara Majstro?

– Ĉu estas ruzaĵo? – mire balbutis sinjoro Fiŝer.

– Aĥ, sinjoro Fiŝkaptisto! – diris subtenvoĉe sinjorino Skinner. – Ĉu vere vi ne kaptas? Kio estas viaj filoj laŭetne?

– Ili estas juddevenaj... – respondis sinjoro Fiŝer.

– Do, viaj nepoj jam estos?...

– Estos... hispanoj! – ĝoje divenis sinjoro Fiŝer.

– Tute ne, – ofendiĝis pro lia nekomprenemo sinjorino Skinner. – Ili estos esperantistoj!

– Jen! – proklamis sinjoro Postnikov. – Jen estas la ĉefa ruzaĵo de nia Majstro! Havante komunan lingvon kaj komunikante inter si, niaj nepoj ne evitos ekhavi propran kulturon, proprajn psikajn trajtojn... sekve ni intencas komplote produkti novan etnon, dissemitan en la mondo! Ĉu vi konsentas?

– Eble... Jes... – respondis sinjoro Fiŝer.

– Kaj jen la vica paŝo: la etno formas novan civiton! – daŭrigis la kapitano. – Kaj tiu nova civito posedas la plej racian lingvon, progreseman intelektan kapitalon, brilan kulturon kaj eble eĉ novan komunan religion... do – en la mondon venas nova etno, nova civito por okupi dignan lokon inter la popoloj dividitaj! Ĉu vi konsentas?

– Ho, sed tio estas jam danĝera! – krietis sinjoro Fiŝer.

– Do, gesinjoroj, ĉu mi divenis la respondon de sinjoro Fiŝer? – demandis sinjoro Postnikov. – Jes? Sekve volu mendi ŝaŭmvinon!

La kompanio ekaplaŭdis.

METANAGRAMOJ

Por solvi metanagramojn oni devas al ĉiu antaŭa vorto aldoni unu literon kaj poste anagramigi ĝin. Ekz., or' – rok' – kron' ktp. Kompreneble, ni uzas nur radikojn, sen gramatikaj finaĵoj.

1. Komenca litero "O": numeralo – malpuraĵo – apuddoma spaco – legomo – municio – malbona aktoro.

2. Komenca litero "S": konjunkcio – liturgio – venonta Dio – alta opinio pri iu – kuraĝa – ŝatanta tenison.

TROVANTO

Trovu en la suba teksto 2 plensencajn frazojn, kaŝitajn inter vortoj. Ekz., "la sciuro estAS BESTO gracia kaj lerta"., ktp.

– Bonan vesperon, Kasper!
– Saluton, Bruno!
– Ĉu morgaŭ matene ni komencos nian vojaĝon?
– Certe jes!
– Sed diru al mi, kial vi decidis veturi al tiuj barbaroj-slavoj, sed ne al iu demokratia lando?
– Ĉar nur inter ili mi povas senti min en amika rondo.
– Vi havas karakteron spiteman, Kasper!
– Mia spitem' por specifa tem', Bruno.
– Nu jes, mi scias, ke ĝis certa grado vi estas obstinema, sed ĝenerale bona amiko. Mi ne kredas, ke vi iĝis disĉiplo rusa.
– Tiu temo nocus al nia amikeco. Prefere ni ŝanĝu ĝin.
– Nu bone, parolu ni pri io alia.

La solvoj de la enigmoj en REGo № 4 (17)

SENFLUGILAJ VERSOJ: *1. La nepoj vin benos; 2. Sonas ŝmacaj kisoj en arbar'; 3. Malproksimo logas nin; 4. Denove somero; 5. Estos malplena la monuj'; 6. Pri kisoj ne avaris; 7. Kaj ankaŭ mi en fin'; 8. Verda stelo sur la brusto; 9. Nian solan nokton ĉiam mi memoros; 10. Ciganin' ne trompos vin!*

TROVANTO: trejnu vian atentemon: *Astero similas al stelo. Krizantemo estas reĝino de aŭtuno.*

La solvojn necesas sendi dum 2 semajnoj post ricevo de la gazeto al Tatjana Auderskaja poŝte (Ukrainio, 65026 Odessa-26, p/k 71) aŭ rete (<zoo@te.net.ua>, <verda99@mail.ru>).

UTILAJ ADRESOJ

REU: p/k 57, 105318 Moskvo; retadreso <esperanto@au.ru>; ttt-ejo <http://www.reu.ru/>

Libroservo de REU: p/k 4716, 432063 Uljanovsk; retadreso <yuka@vens.ru>; plena katalogo <http://reu.da.ru/rus/katalogo.htm>.

REJM: str.Dugina 17 – 62, 140180 Ĵukovskij, Moskva reg.; retadreso <rejm@euro.ru>; ttt-ejo <www.tejo.org/rejm>.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; retadreso <uea@uea.org>; ttt-ejo <http://www.uea.org>.

AMUZAJ MISSKRIBOJ KAJ ERAROJ

Jen estas kelkaj amuzaj eraroj kaj misskriboj, trovitaj dum legado de diversaj E-tekstoj, plejparte – artikoloj kaj informoj, senditaj por REGo: *cicitanaj rajtoj* (anst. civitanaj); *fiko* (anst. filo); *jubularo* (anst. junularo); *kakuli* (anst. kalkuli); *kuiratoro* (anst. kuratoro); *kverelojoj* (anst. kvereloj); *en la kubo "Ĉeno"* (anst. klubo); *lisigitaj* (anst. listigitaj); *Miakelo Bronŝtejn* (anst. Mikaelo); *mimisterio pri klerigo* (anst. ministerio); *ni rajdis kamelon* (anst. sur kamelo); *Niderlandoj* (anst. Nederlando); *olupoj* (anst. okupoj); *Piajn detalojn* (anst. Pliajn); *pundoplektado* (anst. puntoplektado); *Ruslio* (anst. Rusio); *Srudrenkontiĝo* (anst. Studrenkontiĝo); *treatraĵoj* (anst. teatraĵoj).

FELIĈAN NOVAN JARON AL ĈIUJ!

REGo (Rusia Esperanto-Gazeto) *№ 5-6 (18-19) decembro 2003*

komuna eldono de REU kaj REJM

redaktas Garik Kokolija *kunredaktas* Viktor Aroloviĉ

poŝta adreso Pjatnickoje ŝosse 45 – 105, 125310 Moskvo, Rusio

retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2004:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 140 rubloj sendendaj al:

Георгий Владимирович Коколия, Пятницкое шоссе 45 – 105, 125310 Москва

por loĝantoj de aliaj landoj – 15 eŭroj pagendaj al la konto **kklg-r** *ĉe UEA*